HUNGARA VIVO

4
1977
8.- Ft



25 ÉVES
JARA

SZATMÁR BÚTORGYÁR
MEBLOFABRIKO

4700. Mátészalka, Felszabadulás útja
Telefon: 62. 447-503. Telex: 73233

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf.: 193.
Aperas dumonate
XVI. jaro 1977. 4-a numero

Numero pri Endre Ady

ENHAVO

Ady, E.: Artikoletoj *(Benczik,* V.) 1
„ Aŭtobiografio *(Benczik,* V.) 2
„ Poemoj *(Fejes, Kalocsay, Rados)* 3
„ Plori, plori, plori. Hungara Problemo *(Kalocsay)* 4
Kalocsay, K.: Endre Ady 5
Ady, E.: Batalo kun la grandsinjoro *(Kalocsay,* K.) 6
„ Poemoj *(Baranyai, Fejes, Kalocsay)* 7
„ Morto de la naciismo *(Benczik)* 8
„ Poemoj *(Kalocsay)* 9
Varga—Haszonits, Zs.: Endre Ady, la atakita poeto 10
Dobozy, E.: Fajro kaj fumo 11
El hungaraj gazetoj: Diskuto pri lingvoinstruado *(VHZS)* 13
— jes —: Esperantistoj — kontribuantoj al kulturo 14
Akcident-kirurgio (László, I.) 15
Bálint, Sz.: Panoramo 16
Fenyvesi, E.: Literatura metiejo 18
Sokalówna, B.: La telefono 19
László, F.: Balatono *(Pechan,* A.) 20
Szabó, M. R. Revuo de revuoj 26
Szerdahelyi, I.: Socia emancipo de la internacia lingvo 27
Waringhien, G.: Ni kaj ĝi 28
Andrusiewisz, M.: Patro 29
Goodheir, A.: Tago de la solulo 29
Kořiňek, J.: Geteca 29
Szabó, I.: Krucenigmo. Lingvaj ludoj 30
Humuro. Ŝako. Korespondi deziras 31
Leterkesto. Urĝeca valizo. 32

Sur la titolpaĝo: Endre *Ady*

Endre Ady:

Promeneto

Dum dimanĉaj posttagmezoj oni ne laboras, do bonvolu fari mallongan promeneton. Ni ankaŭ diros: kien? Tien, kie ni promenis hodiaŭ.

Proksimiĝas la monato majo. Ankaŭ la verdantaj kaj florantaj arboj allogas. Bonvolu promeni al la Schlauch-parko, kaj al la tiel nomata Kanonika strato.

Neniun ŝoku la dukapa aglo sur la episkopa katedralo.

Ŝajne tiun mizeran trudaĵon ni devas toleri sen kolero.

Sed rigardu la Kanonikan straton kaj pensu.

La ŝutroj de la ekskluzivaj, afektecaj, bonstaton radiantaj palacoj estas mallevitaj. Iliaj loĝantoj estas la plej senutilaj, nenifaraj homoj. Kiu el inter ili laboras, tiu eĉ ne estas ĉi tie. Ekzemple, Wolafka laboras. Li semas konfesian batalon, revolucion en la kalvinana Romo. Tiu dikpufa, grasa pastro, kiu estas nura forto, sango kaj fanatikeco, malutilas al la hungararo pli, ol naŭdek socialistaj agitantoj kaj mil dukapaj agloj. Kaj malutilas ankaŭ ĉiuj ceteraj, senescepte, ĉar ili formanĝas la panon de multaj miloj de malsatantoj.

Mallonge: jen, tia estas la Kanonika strato.

Kaj poste promenu al ajna parto de la periferio. Sed fortigu vian koron. Ĉar vi vidos mizeron, krimon kaj malpuron. Vi vidos, kiom da mizero povus esti mildigita, kiom da larmoj povus esti forvišitaj per la mono de la kanonikoj.

Se vi rimarkos kaj pripensos ĉion ĉi, la dimanĉa promeno estos rezultoplena.

(1901)

Morbus Hungaricus

La ekzantema tifo, kiun la klera Eŭropo iam ekkonis el Hungario kaj baptis ĝin „morbus Hungaricus", nun sekvas la ekzemplon de tiuj hungaraj elmigrintoj, kiuj restis sen laboro en Ameriko: ĝi revenis hejmen. La „morbus Hungaricus" alvenis, ĝi estas en sia hejmo, establiĝis, kaj senĝene oni povas nomi ĝin, eĉ se tio kontraŭdiras al la scienco — tifo de malsato. Ni sekretigas ĝin, kosmetikas ĝin, sed la situacio estas grava, kaj ĉefkapitano Boda jam presigis pri ĝi tiom da afiŝoj, ke ties kosto eventuale sufiĉus por starigo de bone instalita hospitalo. Kaj la oficialaj personoj konsolas, trankviligas la bonstatan klason de Budapeŝto. Bonvolu ne timi: tiu ĉi malsano preferas la malriĉajn „popoltavolojn". Ĝi iras nur tien, kie en unu ĉambro dudeko da homoj enspiras la pestan aeron. Kaj la bonstata klaso de Budapeŝto vere ne estas tiel maltrankvila, kiel oni supozus ĉe tia epidemio. Ja finfine la danĝero estas danĝero por la malriĉaj „popoltavoloj". Tion trankvile ni akceptas; la malriĉaj „popoltavoloj" por ni estas nek jako, nek sako! Tiu ĉi lasta „morbus Hungaricus" estas pli malnova kaj pli terura, ol la alia.

(1908)

Tradukis: Vilmos *Benczik*

Endre ADY:

Aŭtobiografio

E. Ady en familia rondo (en Érmindszent)

Laŭgeografie mi venis el la regiono Szilágyság, el la malnova landparto *Partium,* do nek el Transilvanio, nek el Hungarlando. Laŭfamilie same, nek de supre, nek de malsupre, sed el baraktanta etnobela familio, kiu dum mil jaroj apenaŭ nur vivis. Laŭ malnovaj dokumentoj iam ni estis eminenta kaj riĉa familio, sed jam en la 15-a jarcento nur nobeloj „kun sep prunarboj". Nur mult-ĉevalpova fierego atestas jam en nia animo, ke kun pli da lerto ankaŭ ni povus nun figuri dinastio. Laŭ la patrina genealogio mia praularo senescepte konsistas el pastroj kaj homoj studemaj kaj poetemaj, ekde la tempo de la protestantismo ĉiuj kalvinanoj. Mia avo laŭpatrina servis kiel pastro en la vilaĝo *Érmindszent,* en la vilaĝo, kie mi naskiĝis; mia patro venis ĉi tien al mia patrino el la landparto Interna *Szilágyság.* Mi havas nur tridek unu jarojn, pri kio mia doktoro, la klerega *Konried* inde miras, ja miaj sango, korpo kaj nervoj estas danĝere kadukaj. Mi portas en mi folan sentemon frue manifestiĝantan: frue mi komprenis, amis kaj suferis. En mia infanaĝo min ensorĉis la fabeloj: poemojn mi ne ŝatis kaj nur pene parkeris la psalmojn. Tamen mi skribis poemon eĉ antaŭ ol koni la literojn: mallongan, sed brile mokan baladon pri tio, kiel falis en la koto Lajos, mia pli juna frato. La unua poemlibro, kiun mi havis, estis „Legendoj" de Sándor *Kisfaludy;* ĝin donacis al mi iu el miaj fatalemaj onjoj, kiam mi havis ok jarojn. Tiun libron mi ŝatis, sed *„Himfy"* eĉ kiel plenkreskintan studenton ne povis allogi min, kaj min konkeris por la poezio *„Taso"* de *Goethe* kaj János *Vajda;* tiam mi havis deksep jarojn, kaj, kiel membro de la lerneja memkleriga rondo, mi jam makulstampis mian nomon per multaj poemoj. Mia unua poemo presiĝis en la jaro 1896, en la gazeto *„Szilágy"* de la urbo *Zilah:* ĝi estis patriotisma poemo, pri Lajos *Kossuth.* Sed jam en la jaroj 1890—1891 kelkope ni fabrikadis manskribitan gazeton en la gimnazio de la pia ordeno, en la urbo *Nagykároly.* Nepre mi estus homo kunalispeca animo, se ne jam en la vilaĝo oni igus min ŝanĝi la kalvinanan lernejon je katolika. Kaj se post la katolika monaĥa gimnazio ne ŝanĝiĝus por mi denove la firmamento en la kalvinana kolegio de Zilah. Mi estis elstara lernanto, eminentulo, eĉ, la unua inter la eminentuloj; min bridis tristaj aferoj kaj rememoroj pri la familio. Sed eĉ tiel ne mankis plendoj pri mi, kaj kiam en *Debrecen* kiel studento pri juro, mi aliĝis al la redaktistaro de gazeto, escepte mian martiran patrinon, ĉiuj sentencis: finita. El Debrecen, kie oni ne emis vidi en mi êĉ la plej etan frateton de *Csokonai,* kvankam ĝuste tie aperis mia unua poemlibro, mi iris al Nagyvárad por labori kiel ĵurnalisto. Tiu vibrema, judeca, inteligenta urbo transformis en mi multon, elformitan far la „vilaĝoj" Nagykároly, Zilah kaj Debrecen. Sed ĉi tie spasmigis miajn fingrojn iaspeca obstina cinikeco: ne indas verkadi por fariĝi fine József *Kiss.* Mi faris gazeton, verkis gvidartikolojn kaj evidente mi pereus aŭ komencus terure prudentan vivon, se iu ne venus por mi. Estis Virino, kiu venis, ŝin sendis al mi unu el miaj poemoj, kiu trafis en ŝiajn manojn, kaj ŝi prenis mian manon kaj ne haltis kun mi ĝis Parizo. Tiam ŝi trudis al mi sian volon, sian sterilan vantecon, por ke ĝi ĝermu en mi, se ĝi povos. Ekde tiam mi verkas, batalas, svenas kaj rekomencas: mi ekzistas. Majstrojn mi ne havis, mi ne bezonis havi majstrojn, ĉar mi vivis kaj profunde mi sentis la vivon. Mi sentis, volis, plene, potence; pro tiu granda, senbrida vivovolo balancas la kapon miaj doktoroj, kiam ili ekzamenas min. Mi volis eldiri ĉion, kio povas lanĉiĝi en nune vivanta hungara homo, ĉion, kio nuntempe pelas vivulojn, kiel rimeno la radon de maŝino. Nun mi jam povas konfesi: mi kredas min konscienco de la nuntempa hungararo, de la kultura hungararo, kaj tiu konscienco ne povas esti ĉiam pura. Esence mi scias, kion mi faris ĝis nun, kaj ankaŭ tion mi scias, kion mi ankoraŭ povus fari, se mi havus eblecojn. Nun mi ne pretendas, ke oni vidu min tio, kio efektive mi estas, kaj mi mem ne volus, ke mi estu konata, aŭ fama Endre *Ady* pro miaj veraj valoroj. Nun mi volus elpremi el la vivo ankoraŭ tri-kvar tolereblajn jarojn, kaj mi volus, ke mi povu bone dormi kaj verki kelkion, kion povas verki nur mi. Kaj ke sinjoro doktoro Konried la venontan semajnon, traekzameninte min de la piedoj ĝis la verto, rigardu al mi pli trankvile, pli kuraĝige. Kaj ke miaj malamikoj — al kiuj plej multe mi ŝuldas, ĉar ili verkis en mi obstinon, fieregon kaj forton kvazaŭ superhoman — ankaŭ estonte instigu min.

(1909)

Benczik

E. ADY:

SANGO KAJ ORO

Egale sonas al mi ja tuta
volupta spiro kaj stertoro,
se lirlas sang' aŭ tintas oro.

Mi subtenas, scias, ke: jen Ĉio,
ceteraj estas sen valoro:
sango kaj oro, sango, oro.

Mortas ĉio kaj forpasas ĉio,
salajro, gloro, kanto, rango,
sed vivas oro kaj la sango.

Nacioj mortas, ree ekvivas,
benatu ĉies sankta volo
kun mi konfesi: sang' kaj oro.

1907

Tr. M. Fejes

VIRINOJ SUR LA BORDO

Staris borde mil virinoj
kun tuketoj, kun bukedoj,
ili ploris, manosignis,
mi — jubilis en la ŝip'.

Vesperiĝis. En nebulo
staris borde mil virinoj,
sed ankoraŭ flirtis tukoj,
sed ankoraŭ falis flor'.

Nokto venis, nigra kiel
la Paseo kaj la Venĝo.
Staris borde mil virinoj
kaj mi ploris en la ŝip'.

Ĉar nenion mi plu vidis,
nek tuketon, nek bukedon.
Ŝajne estis nur fabelo:
Staris borde mil virinoj.

1907

Tr. Kalocsay

LA MESIOJ HUNGARAJ

Aliaj estas ĉi doloroj,
estas ĉi larmoj plie salaj,
miloble do estas Mesioj,
se ili estas eĉ hungaraj.

Milfoje ili povas morti,
sed la kruc' neniun savas,
ĉar neniam por ion fari
probablon veran ili havas.

1907

Tr. P. Rados

Leda

DE ER' ĜIS OCEANO

Er' — granda, dorma, stranga sulko,
ĉi marĉon junk', kariko rondas,
sed tra Tibisko, tra Danubo
ĝis Oceano Ero ondas.

Eĉ se min falas l' alto skita,
eĉ se cent damnoj sangon tiras,
eĉ se mil talpoj faras baron,
ĝis Ocean' mi tamen iras.

Mi volas, ĉar ĉagrena bravo,
mi volas, ĉar miraĵ' de l' mondo:
alveni de la Er-rivero
ĝis sankta Oceana ondo.

1907

Tr. P. Rados

Er' — laŭ hungara ortografio Ér: rivereto en la naskloko de Ady. La vorto havas signifon: „tre malgranda rivereto".

PLORI, PLORI, PLORI

Atendi en la nokto dekdu-bata
Je ĉerko, lante alportata.

Demandon pri l'mortint' ne meti,
Al sekvantaro sonoreti.

Sub tend' arĝenta, nigra tolo
Balanci krucon sen konsolo.

En nigro, peza arĝentumo
Sufoke spiri pro l'torĉfumo.

Kun krakaj ombroj batalante
Obtuzan psalmon ĝemi kante.

Aŭskulti je l' orgen' muĝtrema,
Tombsonorilo profundĝema.

Paŝi tra tombaj kavoj glutaj
Kun nigra pastro, knaboj mutaj.

Rigardi kaŝe, ŝtele, time
Mortinton fremdan, trem-anime.

Frosti sub Luno superstiĉa,
Spiregi en incenso riĉa.

Brust-bati pri l'Paseo brue
Sub sorĉ' fatala surgenue.

Konfesi ĉion. Kaj kulp-cite,
Sur ĉerkon fali kor-rompite.

Testamenton teruran aŭtori
kaj plori, plori, plori, plori.

1907

Tr. K. Kalocsay



E. ADY

Hungara problemo

En mia hotelo du tagojn bruadis anglaj junuloj, vojaĝantaj al Ĝenevo: esperantistoj. Estis la unua okazo, ke pro Esperanta klamado mi ne povis dormi. Postnokte, ĉe mia hejmeniro, min kaptis sur la ŝtuparo unu apostolo de la lingvo de doktoro Zamenhof. Dum unu kaj duono da horoj li klarigadis al mi, kia trezoro estas Esperanto. „La lingvo Esperanto prezentas al la mondo civilizita la sole veran solvon de lingvo internacia."* Ili foriris dank' al Dio al sia Ĝeneva kongreso, sed la problemo de Esperanto restis. Jen estos do nepre tiu internacia lingvo, kiu estas „Simpla, fleksebla, belsona".* Sed ĉu sufiĉe simpla, fleksebla kaj sufiĉe belmuzika? Se en Hungario la intelekta kulturo estus moda, cent scienculoj skribus ĉiutage pri ĉi tio. Ĉar la problemo de la internacia lingvo estas problemo hungara ĝis la bazo de la vazo. Kun nia tatara idiomo ni kaŭraĉas ĉi tie, meze de Eŭropo, kiel leporido en kavo. Senparenca, dura, malfacila estas nia lingvo. De mil jaroj ni vivas sur tero buntpopola kaj buntlingva kaj nia lingvotalento estas apenaŭ meza. Post kvindek jaroj la hungara infano devos naskiĝi tiel, ke ĝi parolu almenaŭ angle, germane, france, ĉar male estos ega miso. Poste ĝi devos scii almenaŭ unu slavan lingvon. Verŝajne ankaŭ la japanan ĝi devos lerni. La italoj instruis iam al ni la literojn kaj kun ili ni havos ankoraŭ multon aranĝendan, do ankaŭ ilian lingvon ni bezonos, Jes, ja la hungara infano de la futuro apenaŭ havos tempon lerni ankaŭ la hungaran lingvon. Kaj ĉio ĉi ne estas ŝerco, sed plej serioza realo. Post kvindek jaroj ni malgraŭvole trafos en la intervojon de la interbatalaj kulturoj, tiel ke sen praktikumado ni pereos. Laŭ la sago, kaj se la pensado estus nia malsano, Hungario devus stari en Eŭropo kape de ĉia internaciismo. Nian vivon sole la internaciismo povas savi. Jen kial la problemo de la internacia lingvo estas monstre hungara problemo. Sed mi vetas je ĉiom ajn, ke serioza hungaro ne vojaĝis ĝis nun Ĝenovon al la kongreso de esperantistoj. Francio estas ja distingita lando kaj tamen ĝi donas la plej grandan procenton de la kultivantoj de Esperanto.

La vivo fariĝas pli kaj pli komplika kaj malfacila. Ni ne havos tempon lerni cent lingvojn. Oni devas do zorgi pri tio, ke krom nia gepatra lingvo ni povu prosperi per unu komuna lingvo. Ĉu ne hungara problemo do estas la mondlingvo? Ne centoble pli ĝi estas intereso nia ol tiu de la francoj? Estas flanka afero ĉu Esperanto estas bona aŭ malbona internacia mondlingvo. La celo, la klopodo tranĉas en nian karnon, kiel la razilo. Decus, ke el inter ni estiĝu plej fanatikaj apostoloj de la internacia lingvo. La Iliadon, Dante-n, Hamleton, Heine-n, Ibsenon, Anatole France-on jam ankaŭ nun mi instruigus, eĉ se Esperante, en la hungaraj lernejoj. Frenezi ni devus de la ĝojo, ke ekzistas plano, kiu lude nin enŝtelos inter la kulturajn popolojn. Aŭ, se ne plačas Esperanto, bonvolu do iu hungara scienculo eltrovi pli bonan mondlingvon. Mi ripetas, mi ne scias kiomafoje: ĉi tio estas hungara problemo. Kvazaŭ la mapo hurlas al ni tion, se nia menso jam estas de kvieta naturo. Per unu fojo nin ellevus la mondlingvo ankaŭ el la ungegoj de la germanaro. Ĉi tio — estas hungara problemo.

1906

Tr. K. Kalocsay

*Esperantlingve en la originala hungara teksto.

ENDRE ADY*

(1877—1919)

Centra figuro de sia epoko estas Endre *Ady:* de post *Petőfi* la plej granda poezia kreanto, la plej signifoplena kaj grandformata fenomeno en la hungara liriko.

Ido de malriĉiĝinta prahungara nobelfamilio (kaj tre fiera pri tio, ke li devenas de la patrujkonkera veziro Ond). Ady portas kun si el sia infanaĝo travivaĵojn de kampara vivo, el siaj gimnaziaj jaroj fortan senton de nacia sendependemo kaj kalvinanan Biblian kulturon. Poemojn li komencas verki jam kiel gimnaziano en urbeto *Zilah,* kaj pluraj el tiuj ankaŭ aperis en la gazeto de tiu provinca urbeto. En urbo *Debrecen,* kie li studis juron, li eldonigis sian unuan poemlibron, en kiu ankoraŭ nenio vidiĝas el lia posta verkmaniero: la versoj prezentas tipajn junaĝajn poemojn laŭ la tiama eksmoda modo, en glata formo.

La jur-studadon poste li daŭrigas en Nagyvárad, sed tie li prefere ĵurnalistadas ol studas. Kaj nun li trafas al vivoturno. Nagyvárad, urbo de vigla vivo kaj ekscita moviĝemo, kiu alte superis la nivelon de la aliaj hungaraj urboj, grave influis lin. Tie li konciiĝis pri la subevolueco de la hungaraj cirkonstancoj, pri la neeltenebleco de la feŭdeca reĝimo. Akratonaj artikoloj el lia plumo montras, kiel li fariĝas pli kaj pli liberala, pli kaj pli radikala, klarvida, vaste orientita, brila ĵurnalisto, batalanta sprite kaj impete kontraŭ ŝovinismo, klerikalismo, obskurantismo. En Nagyvárad aperas ankaŭ lia dua poemaro, kiu jam vekis kelkan surprizon, montrante en pluraj poemoj promeson de vere granda poeto.

En 1903 li enamiĝas al bela burĝedzino, kiun en siaj poemoj li nomas Leda. Granda, pasie sensa kaj turmente peripetia estis tiu amo: ĝi daŭris, jen harmonie, jen kun intertorturoj, dekon da jaroj, kaj al ĝi dankas la hungara literaturo riĉan nombron de famaj kaj grandaj ampoemoj.

Je ŝia instigo kaj kun ŝia helpo li venas Parizon kaj pasigas tie pli ol unu jaron. Por li Parizo, la „homdensaja praarbar' giganta", estas liberiga kaj impulsa travivaĵo: ĝia brila kulturo kaj luksо, ĝia libereco, ĝiaj riĉaj eblaĵoj profunde kirlas lian fantazion de juna poeto, plenigas lin per impeta deziro elvivi senbride la vivon kaj per malkontentego pri la hejma senhorizonteco. Sed tiel same li trasentas la internan kontraŭdiron de la burĝa demokratio: li volas atingi trans ĉi tiun. Ĉio ĉi enestas en liaj artikoloj hejmensenditaj kaj ankaŭ en liaj tiutempe verkitaj poemoj, kaj montriĝas jen kiel *nietzsche*-ismo kaj malespera senreviĝo, jen kiel verserĉado al la socialismo; ĉi lastan tendencon plifortigas la rusa revolucio de 1905.

De 1906 ĝis 1914 aperis ok poemlibroj, krome volumoj da noveloj kaj granda nombro da artikoloj. Jam la unua el tiuj poemlibroj, la „Novaj Versoj", vekas tutlandan ĥonon, admiran kaj malaman. Impetaj bataloj komenciĝas: pastiĉoj kaj pamfletoj lin atakas, la tiama ĉefministro *Tisza* fondas eĉ revuon kontraŭ li, en la plej granda konservativa ĵurnalo tuta serio de gvidartikoloj klopodas lin kondamni kaj kompromiti. Liaj admirantoj reagas: la fama revuo *„Nyugat"* eldonas Ady numeron. Li fariĝas kvazaŭ standardo de ĉiuj volantaj novon; frontoj stariĝas por li kaj kontraŭ li.

La poeto mem respondas akre al la atakoj, precipe al la akuzo, ke li ne estas bona hungaro. Li sentas ja en si reviviĝon de praaj hungaraj instinktoj, spiriton de hungara spito kaj protestemo, eternan hungaran triston kaj aspiron. En liaj poemoj meditantaj pri la sorto de la hungara popolo pli kaj pli montriĝas lia koncepto pri lia poeta alvokiteco. Li volas esti ne sole poeto, kreanto de belaj poemoj, sed ankaŭ profeto, *„vates"*, juĝisto en la maniero de la profetoj de l' Malnova Testamento, gvidanto al novaj vojoj. Li sentas sin unu kaj la sama kun sia gento, sakras kaj vipadas ĝin, por elskui ĝin el ĝia stagno kaj movi ĝin por ago, progreso, revolucio.

Ady (lignoskulptaĵo de Tibor Szervátiusz)

Lia dua temo estas la amo, ties mil variaĵoj, la nuda elmontro de la granda komplika-konflikta amkroĉiĝo al Leda, en kies figuro li kreas kvazaŭ la eternan benan-fatalan virinon, la simbolon de la seksa disduiĝo de la homaro. En multaj poemoj li kantas per la tono de kalvinanaj psalmoj kaj malnovtestamentaj profetadoj pri la morto, forpaso, kaj pri la ekscitiĝo de homo ne povanta rezignacii je la predestiniteco. jen defie procesante kontraŭ Dio.

En lia poezio ardas la tuta sufokaera ekscitiĝo de la unuaj jardekoj de nia jarcento, kun ties revolucia febro.

Tiu tre individua poeto, en kiu vivas apuda sensemo kaj trankvila amrevo, ĉaspelo de mono kaj malamo al „grafoj kaj riĉuloj", ĉiama atendo de morto kaj sopiro je plena, vera vivo, kreis por si apartan poezian lingvon kaj apartan mondon de simboloj eĉ apartan prozodion: la akcenton de liaj poemoj difinas la senco, sed oni sentas en ĝi ankaŭ la malnovan hungaran verspulson kaj la tamburetadon de la tempomezura metriko. Lia riĉo je epitetoj, lia verbabundo, liaj proprederivaj aŭ revivigitaj el malnova lingvo vortoj formas lingvaĵon specialan, fortimpresan, tuj distingeblan disde ĉiu alia poeto.

En 1912 ŝiriĝas lia amrilato kun Leda kaj tiu disiĝo ne okazis sen anima krizo. Poste en lia poezio montriĝas spuroj de pasemaj amepizodoj, sed li turnas sin prefere al politika lukto kaj filozofaj meditoj. Pres-

*Prononcu: e!ndre a!di

Noémi Tavaszy: Linogravuraĵo (Min murdos la porko-kapa Grandsinjor')

E. ADY:

BATALO KUN LA GRANDSINJORO

Min murdos, sciis mi, min murdos
La porko-kapa Grandsinjor'.
Rigide sidis kaj rikane,
Sur or' li sidis, sur la or',
Mi sentis, jen decida hor'.

Mi lian naŭzan porko-kapon
Karesis. Tremis li en ĝu'.
„Ekkonu min". Mi flustris. Truis
Mi kapon mian. Tra la tru'
Li vidis cerbon, ridis plu.

(Ĉu min aventurist' sovaĝa
Li kredas?) Falis mi al ter'.
Sur bord' de l'muĝa viv' ni estis,
Ni, solaj. Ruĝas jam vesper'.
„Necesas oro, ormoner'."

„Ne eble al mi plu atendi,
Ja povas murdi min moment'.
Por vojo por plezur' min vokas
Misteraj vokoj, sorĉa tent',
Kaj povas murdi min moment'."

„Haregoj ŝirmas vian koron.
En mi abscesas pusa ŝir'.
Kaj tamen mia kor' benatas,
La Viv' ĝin mordis, la Sopir'.
Necesas oro. Urĝas ir'."

„Je mia jaĥt' la mar' atendas.
Kaj tendoj mil atendas min.
Fremda balzamo, fremda suno,
Nova knabino, fremda vin',
Atendas ĉiuj min, ja min."

„Galopas al mi ĉiu Novo,
Spiregas en mi vivo-tut',
Haoso sankta: miaj soñĝoj,
Kaj viaj soñĝoj: surda mut',
Do krevu brust' por oro-ŝut'."

Vesper' jam nigris, trista, blinda.
Mi ĝemis. Per la ondo-zum'
Senĉese venis logaj vokoj:
Jen ni. Ĉu estas mono-sum'?
Susuris, flustris ondo-zum'.

Kaj ni ekluktis. Tremis bordo.
En lia karn' per ungoŝir'
Mi gratis, taŭzis. Vane. Vane.
Li ridis. Tintis oroj mil.
Ne eblas ir', ne eblas ir'!

Vesperoj pasis, mil vesperoj.
Sang' mia falas flue for.
De fore oni vokas, logas,
Kaj ni nur luktas kun rigor':
Mi kaj por-kapa Grandsinjor'.

1906

Tr. K. Kalocsay

---

kaŭ epopea estas lia batalo kontraŭ la ĉefministro Tisza, reprezentanto de la hungara reakcio. Pli kaj pli maldekstren li tiriĝas, kaj, kvankam lia malsano sonigas sur lia liro voĉon de trompiĝo, rezigno, rifuĝo, soleco kaj mortodeziro, re- kaj revenas ankaŭ la sonoro de fido, kuraĝigo, revolucia alarmo. Ankaŭ lia tono simpliĝas preskaŭ popolpoeme.

Post la eksplodo de la unua mondmilito, Ady, jam laca kaj malsana, tamen laŭtigas sian voĉon kiel senrezerva antimilitisto, kiel „homo en malhomeco".

En 1915 li edziĝas al junulino, kiun li nomas *Csinszka* (Ĉinska) en siaj poemoj. Dum lia sano pli kaj pli malbone statas, lia poezio ankoraŭ pliprofundiĝas, fariĝante pli universala kaj pli pura. En liaj tardaj ampoemoj eksonas nova voĉo: la poeto konfrontas la purecon kaj belecon de la nobla ama sento, la feliĉon, la vorton de la ŝirmoserĉa viro al la regno de la morto kaj malhumano.

En liaj lastaj poemoj la voĉo de poeto soleca sed flamanta kaj suferanta por la homaro aŭdiĝas kun la morna forto de la Bibliaj profetoj.

Li ĝisvivis, grave malsana, la burĝan revolucion tiel atenditan. La revolucio solenis lin kiel plej grandan filon de la nacio, kaj kiam li mortis en la januaro de 1919, dekmiloj akompanis lian ĉerkon al la tombejo.

Kiel dum la vivo, ankaŭ post lia morto daŭris pri li la batalo de opinioj: jardekojn oni diskutis kaj disputis pri lia valoro kaj interpreto. Lia vivoverko estas de epoka signifo en la hungara liriko, kvankam liaj speciale-apartaj formoj kaj esprimoj estas neimiteblaj.

La nuna generacio envicigas lin inter la grandajn hungarajn revoluciajn poetojn: lia granda poezio fidele respegulas la maltrankvillan, ribeleman mondon de la centjar-komenco, ĉiun problemon de la hungara nacio, popolo, ĉiujn animkonfliktojn de la moderna homo. Lin, la nobelidon, edukis la burĝa progresemo; kaj li, reprezentanto de la hungara kampularo, pranepo de la kampul-ribelestro *Dózsa*, kiel li nomis sin, etendis sian manon al la hungara proletaro — fakte li ĉirkaŭfermis anime sian tutan genton.

Krom tio — li estis tre granda poeto.

(1962)

Kálmán *Kalocsay*

ENDRE ADY:

KRUCIFIKSO EN ARBARO

Arbare neĝa krucifikso:
En granda, luna nokto vintra:
Memor' malnova. Tie portis
Min foje sledo gaje tinta
En granda, luna nokto vintra.

La patro, gaja vir' ankoraŭ,
Rigardis ĉiun krucon kante.
Kaj mi, la fil' de mia patro,
Skulptitajn bildojn enuante,
Rigardis ĉiun krucon kante.

Du spitaj, skitaj kalvinanoj,*
Kiel la Tempo ni rapidis.
Patro kaj fil': unu Jes, unu Ne,
Ni flank-ĉe-flanke kante sidis,
Kiel la Tempo ni rapidis.

For dudek jaroj. Kaj en penso,
Nun mia sledo glitas tie,
Kaj, kion tiam mi neglektis,
Mi la ĉapelon levas pie.
Nun mia sledo glitas tie.

1908

Tr. K. Kalocsay

NEPO DE GYÖRGY DÓZSA

Nepo de György Dózsa mi estas,
Popolamanta, ĉifona nobelo.
He, grandsinjoroj, atentu popolon
Falĉilan mian, ĉar ardas Somero.

Somero ardas, falĉiloj rektas.
Grandsinjoroj: aĉaj pugnoj blankaj,
Kio, do se vaga pleb' de Dózsa
Furioza fluos atakanta?

Grandsinjoroj, se venos popolo,
Kien fuĝos via rabist-hordo?
Se ni kun bruo la pordegon
Fermos ĉe l'fuorto?

1908

Tr. M. Fejes

**skito* (en PIV *ankaŭ scito)* ano de popolo(j) vivinta(j) en antikva tempo norde de Nigra Maro. Laŭ popola diro de ili devenis hunoj kaj hungaroj.

I. Fejes; Kuprogravuraĵo: Alflugis la pavo

LA STELO DE STELOJ

Neniam falos stel' la ruĝa;
Jam falus sun' kaj ĉiu stelo,
Sed ĝi firmas sur ĉielo.

Falanta stel' ne estas ruĝa,
Sed blua, verda aŭ dub-hela.
Tio estas leĝo ĉiela.

Falu steloj, falu milope,
En mil falegoj, veo, ploro.
Eĉ per unu venos aŭroro.

Vi tronu brile, ruĝa stelo.
De kiam sentas hom' mizeron,
Ruĝa stelo donis esperon.

1908

Tr. I. Baranyai

Morto de la naciismo

Ady kun Mihály Babits en redakcio de Nyugat

Oni ne bezonas esti Matusalemo por povi ĝisvivi certan belegan ĉi-teran okazaĵon, ĝojindan forpason. Nia Eŭropo, mokata maljuna, sed fakte ĉiam pli juniĝanta, forpelas finfine abomenindan demonon desur sia brusto: la naciismon.

Mi nomis ĝin demono, sed ĝi estas pli ol demono. Ĝi estas unu el la malfeliĉaĵoj de la homaro. Ĝi estas iaspeca parazita kreskaĵo de la homa kulturo, kiu ŝovas siajn radikojn tre profunde en la grundon sub la fifamaj ŝimaj palacoj en Romo, Tibeto, Moskvo, Istambulo kaj aliaj lokoj. Ĝi sufokas kaj murdas per siaj milione multaj brakoj.

Kiom da historiaj maljustaĵoj jam okazis per ĝi! Kunbataligo de popoloj, estingo de la lumo, surtreto de la libero. Estas mirinde, ke la homaro atingis tiom, kiom ĝi efektive atingis.

Elokventaj, grandaj signoj nun anoncas, ke alvenis la tempo de ĝia likvido. Ĉie, kie la progreso ne estas nura kliŝa slogano, la popolo kun lumiĝanta animo jam prepariĝas fortanime elŝiri el la herbario de la homaro tiun ĉi venenan, parazitan kreskaĵon.

La naciismo estas furioza patriotismo. Eĉ ne tio. Kvankam la nomo „patrioto" estis jam multfoje kompromitata, tamen ĝi estas ankoraŭ ŝildo de pli sankta nocio, ol ke ĝi povu uziĝi por etikedi la naciismon. La naciismo ne estas patriotismo. La patriotismo estas tia *sine qua non* de la homo kaj socio, ke ĝin eĉ ne necesas koncizigi nocio, kaj ne necesas serĉi vorton por ĝi. Homoj vivantaj en komuna kulturo kaj agantaj en komuna socia laboro, estas ĉiuj patriotoj. Kaj tiuj, kiuj estas malamikoj de la progreso, de la strebado por pli bona mondo, de senkondiĉa libero por la homa intelekto, tiuj estas perfidantoj de la patrio, eĉ se ili kantadas senĉese la nacian himnon.

La mondo staras antaŭ baldaŭa senmaskigo de praa mistifiko. Ne estas hazardo, ke *Pobedonoscev* falas desur la ĉefprokurora trono, kaj ke la tria franca respubliko, kiel giganto, ĝuste nun morttretas konspirantan Bonapartistan formikaron, kiu bazis siajn esperojn en la naciismo. Kaj la laborula Germanio same nun deklaras denove, ke ĝi ne pretas apogi cezarajn frenezaĵojn, prezentatajn sub la ŝildo de furioza patriotismo. Kiel same nun avertas sian popolon la granda verkisto Björnsterne *Björnson*, ke ĝi ne lasu misgvidi sin far la naciismaj apostoloj disde la vera progreso kaj kultura evoluo. La mondo plenplenas je grandiozaj antaŭsignoj. Ni vidas la agonion de la naciismo.

La naciismo probable plej bone observeblas en la nigra, sed ne sekretema animo de Pobedonoscev. Li estis pli ultramontana,* ol la papoj de la mezepoko. La mondo apartenu al la caro, al la pastroj de la vera religio kaj ne al la slava hordo. Prefere estu milito kaj pesto, ol la popolo pensu kaj volu.

Tia estas la kruda tipo. Pli sincera, ol la Dalailamao, ĉiukaze multe pli sincera, ol imperiestro Vilhelmo, generalo *Galifet* aŭ *Dérulède*. Kiel la homaj socioj evoluis laŭ diferencaj vojoj, tiel ŝanĝis sian fizionomion ankaŭ la naciismo. Ĝi stultigas otomanon en la nomo de Allaho, ebriigas francon per *gloire*, vekas malamon kontraŭsvedan en norvego, kaj volas revigi pri pangermanismo germanon. Kaj en la socioj, en kiuj kunvivas pluraj nacioj, zorgas pri aparta naciismo por ĉiu el ili tiuj, kiuj estas interesitaj, ke la oligarko floru en sia malnova aŭtoritato kaj laŭ la malnova maniero. Ĉar la naciismo taŭgas unuavice por tio, ke la amaso, ebriiĝinta per ĝi, ne rimarku, kio mankas al ĝi, kaj por kio ĝi havas rajton. En Francio jam estus malbela la brutala sincero de Pobedonoscev. Tie la ultramontanoj batas al si la bruston kiel respublikanoj. Ili eĉ flirtas kun la liberpensado. Kaj se ni emus ironii, ni povus diri, ke ne ekzistas pli internacia forto kaj ideo, ol la naciismo.

La popoloj jam komencas vidi per la okuloj, kaj se ie kaj tie Eŭropon foje-foje superregas naciisma konvulsio, ĝi estas nura koreo.** La naciismo baraktas kontraŭ la likvidiĝo. Eble jam baldaŭ en la mondo ne plu devos honti la veraj patriotoj. Eĉ en Rusio la likvido komenciĝis. Kaj ĉe ni — kiom longe tio malfruos?

1905

Tr. V. Benczik

**ultramontana:* ekstreme klerikala, tro papisma (trans la montoj Alpaj)

***koreo* (en PIV), *ĥoreo* (en Hung.—E. vortaro): danco de sankta Vito (organika, spasma nervomalsano en infanaĝo)

REMEMORO PRI NOKTO SOMERA*

Tamburis ĉefanĝel' kolera
Al Ter' alarmon furioze,
Junuloj frenezumis ame,
Kaj estis svarma falo stela,
Kaj virgokufoj falis same:
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.
Ekbrulis nia abelej',
Piedrompis ĉevalid' plej bela,
Vivis mortint' en mia sonĝ',
Perdiĝis nia hund fidela,
Kaj nia muta servistin'
Ekkantis, jen per voĉo kvera:
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.
Friponoj fierfanfaronis,
Rabis eĉ rabist' delikata,
Kaj kaŝis sin la homo vera;
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.
Ni sciis ja: la hom' falemas,
Estas tre ŝulda pri la amo,
Tamen, tre strangis nun ĉi turno
De l'nuna, fora mondo tera.
Neniam la lun' pli moka estis,
Neniam la hom' pli nanmizera,
Ol dum ĉi tiu somernokto:
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.
Terur' sin klinis sur animojn
Kun malicega ĝoj' infera,
Obsedis ĉiun fat' mistera
De ĉiu antaŭulo lia.
Al fest' terura, sangebria
Ebrie iris nun la Penso,
Servist' fiera de la Homo,
Kaj nun, jen kripla kaj mizera:
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.
Ho kredis tiam krede mi,
Ke ia neglektita Di',
Revivos, portos min en morton.
Kaj jen, ĝis nun mi vivas, tia,
Kia min faris tiu nokt' magia,
Kaj Di-atente mi memoras,
Memoras tiun mond-dronigan,
Teruregan somernokton:
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.

1918

Tr. K. Kalocsay

*La nokto de la eksplodo de la unua mondmilito

Ady kun sia patrino kaj Csinszka

ADMONO AL LA GARDANTOJ

Gardantoj, gardu sur posteno.
La noktoj estas stelo-ŝutaj.
Lampiroj vibraj en ĝardeno,
Memoroj pri someroj foraj,
Somer' Florenca; kaj en ĉeno,
Memoroj pri l' aŭtuna Lido,
Pri l'karaj balaj balaaĵoj
En la vapora ĉambro de l'
Adiaŭbalo, je mateno.
Kaj ĉiuj beloj, vivoj, kantoj,
Eterne vivaj mortaj horoj,
Ĉiuj mortintoj kaj vivantoj,
Kaj malproksima rid' de koroj,
Vin petas orfe, en ĉagreno:
Gardantoj, gardu sur posteno.

Gardantoj, gardu sur posteno,
La Vivo vivas, vivi volas,
Ne tial ĝi per beloj multaj
Nin benis, ke tra ili vadu
Ĉi diablajoj sangaj, stultaj,
Dolore estas esti homo
Teruras bestheroaj diroj.
Stelŝutaj noktoj kaj lampiroj
Tamen ne lasas nin forgesi
Pri l' Fid', ŝpinita en la Belon.
Angore, orfe, en ĉagreno,
Gardantoj, gardu sur posteno.

1918

Tr. K. Kalocsay

Endre Ady, la atakita poeto

Kiun ajn socian reĝimon, ĉiam kaj ĉie, karakterizas la fakto, ĉu ĝi akceptas aŭ malakceptas, ĉu rekonas, diskutas, eble atakas siajn poetojn. Ne temas pri la ĉie-troveblaj flatuloj, kiuj naĝas kune kun la ŝanĝiĝantaj politikaj torentoj; sed pri tiuj poeto-profetoj, kiel ekzemple nia Sándor *Petőfi* aŭ Endre *Ady*.

Ne estas eventuale, ke la geniaj poetoj ĉiam naskiĝas en tiu epoko, kiam abundas la sociaj farendaĵoj, kiam la savo de l'nacio estas ĉefa tasko, por ke ĝi ne forfalu en la abismon. La hungararon multfoje minacis simila danĝero, kaj meze de la socia, nacia krizo ĉiufoje aperis tiuj genioj, kiuj — pere de l'forteco de la poezio — provis kaj kuraĝis kontraŭstari, eĉ ataki reĝimon, ruinigantan la nacion.

Ankaŭ Endre Ady devis fortostreĉe lukti, por ke li ne estu tretita en la koton far la „oficiala Hungario", dum longaj jaroj klopodanta malhonorigi lin. La batalo komenciĝis kun la debuto mem de Ady, kaj postvivis lian morton. Ne nur la poemoj, sed la homo mem estis grave atakita: lia persono, privata vivo kaj moralo: Ady estis tiom minaca fenomeno meze de la hungara reakciemo, ke nenio estis akceptebla rilate lin. Ni citas la vortojn de l'verkisto László *Németh:*

„Ady estis tro granda gluto por la hungara stomako. Ni kredas: pri Ady ne necesas diskuti, sed rekonstrui la konsekvencecan fluon de lia vivo, tiel, kiel li mem priskribis ĝin, sen ekskuzoj kaj sinkulpigo; tiam evidentiĝos, ke Endre Ady jam nerevokeble fariĝis historia fenomeno."*

„Kiu rajtas ekzameni la poeton?" — demandis Ady, respondante al la atakoj. Tiun rajton postulis por si tiuj personoj, kiuj ne kapablis aŭ ne kuraĝis penetri en la profundon de l' Ady-a mondo de simboloj. En la publika diskuto la atakantoj multfoje riproĉis lin, ke lia simbola poezio estas nekomprenebla, sekve — senvalora. Interese estas citi ĉi-rilate la opinion de laboristo, kiu estis nek literaturisto, nek kritikisto, tamen kapablis kompreni la poezion de Ady, ĉar ĝi esprimis la sentojn kaj mondkoncepton de la ekspluatitaj amasoj: „Nur tia literaturo estas moderna, kiu enfermas novajn konceptojn en novan formon. Sekve, la moderna poezio apartenas al ni, al la laboristaro."

Pri kio estis akuzata la poeto? Jen: pri malpatrioteco, pri malhungareco, pri malmoralo... Gravegaj akuzoj kontraŭ geniulo! Kial?

Ady jam kiel junulo ekkonis Parizon, ĉefurbon de l' arto kaj moderneco. La spertoj de tiu vojaĝo seniluziigis lin: la mizera, kompatinda senkultureco de Hungario des pli evidentiĝis, ju pli larĝiĝis la perspektivo antaŭ la poetaj okuloj. Ady senkompate ekvipis sian patrion per iloj de la poezio. Tiun patrion, kie sufokiĝas ĉiu bono, ĉiu homeco. „Ĉu mi ne estas hungaro?" — ekkriis la vundita poeto. Ĉu tiu amas la nacion, kiu malsanigas ĝin, kaj ĉu ne tiu, kiu senesperiĝinte, sinkonsumante serĉas la kuracilon?

Li estis unu el la malmultaj, kiuj ekde la unua tago de l'militо konsciis, ke tio ne estas intereso de la popolo, ke la militо forrabas la estonton de la opaj nacioj, ankaŭ de la hungararo. „Ĉiu mensogas, estas nur mi, kiu eldiras la veron. Ĉu eblas tiel la vivo?" — demandas li amare. Li, kiu ĉiam fieris pri sia hungareco, eĉ nun restis patrioto, profetante la popolsavan revolucion.

La revolucio savus ankaŭ la aliajn popolojn. Ady suferis ne nur pro la sorto de la hungaroj, sed ankaŭ pro tiu de ĉiuj ĉe-Danubaj popoloj. Jen, alia „granda peko" de l' poeto: kiam oficiala poeta honoro egalis naciismon, malestimon kaj malamon al ĉiuj cirkaŭaj popoloj, aperas poeto, publike malhonorigita kaj vundita je sia homa digneco, kiu kuraĝas ektondri, disfamante la egalecon kaj komunajn interesojn de hungaroj, rumanoj, serboj, slovakoj... Endre Ady apartenas ne nur al ni, hungaroj, sed al ĉiu, kies sorton kaj estonton la poeto enteprenis: samkiel antaŭe Sándor Petőfi, kaj poste Attila *József*.

„La sorĉo de l'poezio efikas ene de la nacia animo" — konstatis Attila József. La pura poezio de Ady sorĉas nin, hungarojn, kaj ni emus transdoni tiun sorĉon al aliaj popoloj. La poezion de l'profeto, de l'revoluciulo, kiu honeste, ĝisfunde esploris la nacian sorton — kiu mem estis la revolucio.

Zsuzsa *Varga-Haszonits*

Tombmonumento de la poeto en tombejo Kerepesi



*Tiu konstato de L. N. formuliĝis ĉ. kvindek jarojn post la morto de Ady.

IMRE DOBOZY:

Fajro kaj fumo

En la kooperativa garbejo de vilaĝo Skuiĝo ekflamis pajlofasko. Krom la flamanta pajlo, troviĝis en la garbejo eluzita kribrilo, aro de mineralsterko, kelkaj malplenaj sakegoj kaj plenplena benzinbarelo. Se la flamoj atingus la benzinon, Skuiĝo travivus terurajn malfeliĉojn.

Dum tiuj danĝerplenaj momentoj en la proksimeco troviĝis ankaŭ tri viroj: Johano Forĝista, Andreo Ŝtipa kaj Bartolomeo Tujmialportas. Ludoviko Sala, vid-atestanto, naskiĝinta en Skuiĝo, fraŭlo, laŭreligie reformaciano, eksterpartiulo sed patriota, kredithava viro, meblisthelpisto, kiu tiutempe paŝadis sur la kontraŭa trotuaro, poste jene resumis la okazintaĵojn:

En la garbejo, la pajlo flamegis.

Andreo Ŝtipa trakuregis la korton, elsputante hororan blasfemon, kaj kaŝiĝis en la fundega fundo de la korto, malantaŭ lignan budon. Tie li tuj ĉesis blasfemadi, kuŝiĝis stomakon suben kaj fermis la okulojn.

Bartolomeo Tujmialportas ne blasfemis, sed kaŭriĝis en la putsitelo, kaj alkroĉigante sin al la putostango, rapide subenveturis en la profundon.

Johano Forĝista rigardadis en granda timo la fajron, turnante la kapon dekstren-maldekstren, tamen ne forkuris, ĉar li ja ne havis tempon por forkuri. La flamo eklekadis la pajlon, tre proksime al la barelo. Johano Forĝista iel-tiel regajnis la spiritan ekvilibron, rulfaligis sin sur la flamantan pajlon, kaj rulfaliĝadis kun la pajlo, ĉiam pli foren puŝante la barelon, ĝis kiam sukcesis estingi la fajron. Sed liaj vestoj ekflamiĝis, la manoj kaj piedoj brute brulvundiĝis, tamen, je kosto de kelkaj vundoj, li savis la barelon.

Sed tute ne nur la barelon! Garbejon, fojnamasojn, maŝinojn, brutaron, grandajn havaĵojn, ĉion, kio estus predo de la fajro, kune kun la duona vilaĝo, se la benzinbarelo estus eksplondinta. La vento blovis el sudoriento, la flamoj nepre estus atakintaj la najbarajn domojn, kiel jaron antaŭ la unua mondmilito, kiam ekflamis la ilarejo de l' fajrobrigado, kaj la „Subastrato" tute forbruliĝis, ĉar ankaŭ tiam el sudoriento blovis la vento.

En la asembleo, organizita tri tagojn post la fajro, kie Johano Forĝista prezentiĝis lamante kaj en bandaĝoj, estis proklamite, ke la supre menciita persono savis el la pereo sume unu-miliono-sepcent sesdek kvin-mil kvarcent naŭdek tri forintojn kaj kvardek ok filerojn, en kiu sumo enestis la valoro de l' bekeŝo de Benjameno Kota-Dorna, kiun la koncernulo forgesis en la garbejo antaŭan nokton, ŝtelinte lignotabulojn. La konsilantara estro deklaris, ke pro lia modele sindonema ago, al Johano Forĝista decas danko, cetere kvin mil forintoj kiel premio, cetere promociigo al brigadestreco.

Se la homoj volas esti dankemaj, tre malvolonte forlasas ties esprimadon. Johano Forĝista estis trošarĝita de laŭdoj kaj donacoj. La maljunega Imre Vidanta alportis al li sian plej belan argilan pipon. Mi ne pipfumas, diris honteme la festa heroo. Faras nenion, vi ankoraŭ povas alkutimiĝi al pipfumado, stimulis lin Vidanta. Sed tio estis nur kvazaŭ enkonduko al la vera gloriĝo. La estro de la urba konsilantaro, en iu kunveno, deklaris, ke estus tre miopa kaj ŝovinisma konduto, se la kooperativo alproprigus al si Johanon Forĝistan de kapo ĝis piedoj, ĉar la menciita persono estas heroo ne nur de la kooperativo, sed de la tuta vilaĝo, do oni traktu lin konvene al tio, sekve estas jam tempo honori lin per festeno ligita al solena konsilantara kunveno. Tiu penso kaptis ĉiujn. Finfine konsilantara kunveno, kie la partoprenantoj estas instigataj ne al alparolo, sed al manĝaĵ-trinkaĵ-plena diboĉo. La konsilantaranoj — etaĵon oni preterrigardas — tuj aprobis la festenon per voĉdono, ĝi estu pagota el fonduso celanta evoluigon de l' vilaĝo, nome el tiu sumo, kiu estus uzata por konstrui la Subastratan trotuaron. Ege logike cerbumis la vilaĝanoj: se Johano Forĝista ne estingas la fajron, la Subastrataj domoj ĉiuj forbruliĝas, sekve la strata trotuaro tute ne bezonatas.

La bienetanoj oferis du ŝafidojn, la Brasikacidiga Entrepreno de Skuiĝo unu barelon da brasiko, la sodakvo-fabriko kvindek botelojn da sodakvo, la societo de ĉasistoj dek leporojn (pro la ĉasprohibicio la leporoj bedaŭrinde ne povis esti pafitaj), la laktovendejo oferis poton da acida lakto, do, ĉiu donacis, laŭ siaj eblecoj, el la vilaĝa mono estis necese aĉeti nur du skatolojn da dentpikiloj, tri kandelojn (por la okazo se la elektra lumo eventuale estingiĝus), kvardek botelojn da brando, du porkojn kaj kvinhektolitran vinbarelon. Majesta vespermanĝo surtabliĝis! La servistinoj estis dudek kvin virgulinoj en blanke blankaj kostumoj (estis sufiĉe malfacile kolekti en la vilaĝo tiom multajn blankajn kostumojn). Delegito de l' registaro transdonis al Johano Forĝista la Hungaran Ordenon por Pajloestingantoj, la parohestro komparis la honoritan personon kun Sankta Sebastiano, la konsilantara estro kun *Čapajev,* la lernejdirektoro kun *Mucius Scaevola,* la drinkejestro kun Sándor *Rózsa.*

Studento verkis draman poemon, komencantan jene:

Forĝisto la Brava, lasu vin dolor',
En Skuiĝ' ja vivos ĉiam via glor'!

Ĉiujn ĉeestantojn kortuŝis la pompaj alparoloj. Malamikoj interpaciĝis, kune drinkante la senpagan vinon.

Sed la festenaj oratoroj faris eraron: dume ke Johanon Forĝistan ili envolvis en gloron, akre riproĉis la du aliajn civitanojn, kiuj ĉeestis la garbejan brulon. Ĉiu oratoro komencis sian parolon tiel: jen staras antaŭ ni la heroo de Skuiĝo, kiu restis homo eĉ inter flamoj kaj fajreroj, ne tiel la du aliaj, unu nomata Andreo Ŝtipa kaj la alia nomata Bartolomeo Tujmialportas. Diferencigo inter homo kaj homo estas ĉiam riska, ankaŭ labortage, sed pleje festotage! Ne ŝatas tion la hungara karaktero.

La koncernaj viroj, aluditaj tiele, englutis multon amaran. Estas ja sufiĉe hunda mem la fakto, se iu forkuras, kiam li devus resti enloke. Sed ke li estu krome ĉiupaŝe aludata? La du viroj baldaŭ ĉesis honti. Ili ekkoleris. Ne decas, ke ĝuste ilin vizitas plago post plago. Se la estroj de Skuiĝo komencus denombri ĉiujn, kiuj en la vilaĝo, en la departemento aŭ en ĉi tiu ĉarma landeto forkuris diversokaze de tie, de kie neniel decus forkuri, ilia lango kaj buŝo eluziĝus. Do, tuj kiam el la Skuiĝaj kapoj vaporiĝis la festena febro, kaj sekvis la diligentaj labortagoj, Ŝtipa kaj Tujmialportas opiniis, ke alvenis por ili la momento por pli objektivigi la bildon de l'fama brulado. Iun vesperon Andreo Ŝtipa deklaris, post kiam la drinkejo pleniĝis de homoj:

— Vere, ni forkuris de la fajro, dume ke Forĝista restis tie. Tamen, neniu demandis ĝis nun, kial ni forlasis la lokon, kaj kial restis tie Forĝista? Povas esti, ke ankaŭ li estus forgalopinta, sed jam ne kapablis kuri.

Sekvis granda silento. Do, tiu Forĝista eble jam ne povis forkuri. Ne temas pri tio, ke li ne volis: li ne povis. Iu demandis:

— Li vertiĝis* eble pro la fumo? Li svene falis eble sur la pajlon?

Kompaĉjo Ŝtipa levis la ŝultrojn. Li ne scias, ĉu Forĝista svenis aŭ ne svenis. Li scias nur ion certan. Havis kaŭzon, ke li kuregis ĝuste ĝis la ligna budo, staranta en la fundega fundo de l' korto. Tio havis gravan kaŭzon. Ĉar se la benzino eksplodas, ekfajros nur, sed la fajron eblas estingi, la fajrobrigado ja havas ege modernan ŝprucigilegon. Dume se la ligna budo — nome, la necesejo — eksplodas, neeblas defendiĝo. Estas terure imagi, kia inferna odoraĉo kaj fiaĵoj bombardus tiam la senŝirman vilaĝon.

— Ne — diris Andreo Ŝtipa —, ne, mi ne celas fariĝi brigadestro. Nek kvin mil forintojn mi volas, sen ke mi perlaborus ĝin. Sed kiu meze de la danĝero elektis la plej malbonan gardejon tiu meritas nur riproĉojn?

Bartolomeo Tujmialportas fervore daŭrigis:

— Kial mi enrampis en la puton? Vidu, eĉ la oratoroj forgesis, ke por fajroestingo bezonatas ne obstineco, sed akvo. Eĉ nuntempe, en la socialismo. Sed neniu pensis pri akvo, neniu krom mi. Nu, mi ricevis pro tio batojn sur la kapon, sed stultulo estas, kiu uzas sian cerbon por pensado, ĉar pro la pensado oni ricevas stangobatojn, dume pro rulkuŝado estos glorigata ĝisĉiele.

Similaj teoriumadoj, paŝo post paŝo, enradikiĝis en la Skuiĝaj kapoj. Enestas ia vereco en la diro, ke la sorto disdividas la bonŝancon kaprice, neniam laŭ la meritoj. Tiu Forĝista iomete bruletigis sian haŭton, kaj oni preskaŭ sanktuligas lin. Samtempe aliuloj laboras de eklumo ĝis mallumo, akiras havaĵon, riĉigas la komunumon, strebadas, tamen neniu ĵetas al ili eĉ ereton de rekona vorto.

Iun vesperon la drinkejestro eldiris strangan konstaton, malgraŭ ke — laŭ siaj propraj vortoj — li ne volis intermiksiĝi en la vilaĝajn, malplej en la landajn aferojn, sed li bone rememoris, ke aŭtune de 1943, antaŭ la vilaĝa konsilia domo, Johano Forĝista salutis la edzinon de l' ĉefnotario — faŝisma partiano — per laŭtega „Mankisojn, sinjorino!". Ho — ekstertoris unuvoĉe la drinkeja publiko —, evidente, li flatis do la sagokrucanojn! Sekvan matenon la famo jam alvenis en la konsilantar-estrajn orelojn. Hu, la pigo ĝin piku! Tre malagrable. Kion diros la distriktestroj, informiĝinte pri tio? Kaj la departemento? Kaj eble eĉ la registaro? Povas esti, tamen, ke nenio eksciendas ĉi-rilate. Povas esti, ke tiu famulo Forĝista estas deca, honesta viro. Sed ankaŭ povas esti, ke ne... Cetere, ĉu honesta, ĉu malhonesta — cerbumos la kamaradoj —, ĉu ne tro rapidis la Skuiĝanoj pri la arangxo de honora festeno? La konsilantara estro ne prokrastis tion, kion li devis fari, estante responsula persono. Li vizitis tuj la vilaĝajn kaj kooperativajn estrojn, proponante, ke ili kune formu ekzamenan komisionon, kiu unu fojon por ĉiam fiksu la lokon de Johano Forĝista en ĉi mondo. La komisiono serioze eklaboris, traesplorante la ĝisnunan vivon de Johano Forĝista, kolektante pri li ĉiujn kolekteblajn indikojn. Sed nenion suspektendan ili trovis, nur tion, ke ĉi Johano Forĝista ĉiam nur laboris. Li laboris por la bienulo, post ricevo de propra parcelo li daŭris labori, li daŭris labori ankaŭ en la kooperativo: jena persono ĉiam laboris, nur laboris, eĉ neniam neniun vangofrapis, eĉ neniam drinkigis sin horizontala, eĉ neniam ŝarĝis sin per ĉiutaga ŝuldeto. Jena mizerega vivovojo definitive strečigis la okulojn de l' komisiono. Se tiu Johano Forĝista neniam faris ion eksterordinaran, tiam kial li estus farinta similaĵon ĝuste la tagon de la fajro, en la garbejo? Heroo ĉiam restas heroo, ĉu en paco, ĉu en milito, rekonebla jam per lia rigardomaniero. Sed kiu ne estas heroo, tiun eĉ ĉiuj fajroj de l'mondo ne povas heroigi — tio evidentas.

Povas esti, eĉ, ke li mem ekbruligis la pajlon. Por ruze enkuŝiĝi tie, kaj frape varmigi sin ĝis la brigadestra posteno. Ne estus mirige, konante lin. Tia ruza homaĉo. Ĉar fakte ruzeco diktas, ke oni agadu

---

**vertiĝi:* havi kapturniĝon (Pe—vortaro: H—E kaj E—H)

En kolumnoj de pluraj hungaraj gazetoj:

Diskuto pri lingvoinstruado

Ne nur en Hungario, sed tra la tuta mondo la krizo de l'lingvoinstruado fariĝas ĉiam pli akuta problemo. La kompetentaj instancoj ne preterlasas tion, ili pretigas reformprojektojn celantajn frape venki ĉiujn malfacilaĵojn, sed ŝajnas, ke nenia, eĉ la plej moderna instrumetodo kapablas forigi la mondan krizon de l' interkomunikado.

La presio, kiu montriĝas ĉiam akrasenta rilate la plej maltrankviligajn mondfenomenojn, lastatempe oferis sufiĉan spacon al la diskutantoj pri lingvoinstruado. Temas unuavice pri *Magyar Nemzet* (Hungara Nacio), organo de la Patriota Popolfronto, pri *Kritika* (Kritiko), monata revuo pri kulturo, krome pri *Köznevelés* (Publika Edukado), kaj *Pedagógiai Szemle* (Pedagogia Revuo).

Parolante pri lingvoinstruado (kaj -lernado, respektive) neeblas preterateni la instruadon de la gepatra lingvo, ĉar gepatra-lingva kulturo kaj fremdlingva kulturo kondiĉas unu la alian. La lingvoinstruado komenciĝas tiam, kiam la infanoj lernas sian propran gepatran lingvon, sed tio signifas ne nur lingvolernadon, sed ankaŭ alproprigon de la nacia kulturo, kiu kristaliĝinte kaŝiĝas en la diversaj tavoloj de la lingvo. La mankoj de nia gepatra-lingva edukado montriĝas tie, kie la instruprogramoj kaj ties realigantoj preteratentas ĉi bazan principon.

Ĉe instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj ĉi tiu principo ne estas primara, ĉar la celo devus esti la aktiva alproprigo de la koncerna fremda lingvo, kvankam ĉiterene kelkaj diskutantoj reprezentas tute kontraŭajn opiniojn. Unu el ili substrekas, ke ni ĉiam devus klopodi por ke la lernantoj atingu la aktivan lingvoscion, ĉar la ĉefa celo de lernado de fremdaj lingvoj estas absolute praktika: la reale atingebla nivelo de lingvoscio estas, ke oni povu utiligi ĝin en la ĉiutaga interkomunikado. La oponanto de jena opinio unue metas demandosignon post la esprimo: „lingvoscio", ĉar ĉi tiu koncepto ne estas unusence difinebla. Laŭ la ĝenerala konsidero, lingvoscio egalas aktivan lingvoscion — kiel ankaŭ la supre citita alparolanto konstatis. Sed — argumentas la oponanto — ankaŭ la pasiva lingvoscio ne estas malestimenda, ĉar en multaj terenoj la specialistoj bezonas nur tion, ke ili kapablu facile legi kaj kompreni la fremdlingvajn tekstojn. Eĉ ne parolante pri tio, ke en la nunaj kondiĉoj de lingvoinstruado, kiam multas la malfacilaĵoj ankoraŭ nesolvitaj kaj la konfuzo de metodoj ne ĉiam efikaj — ekz. la lernantoj post okjara okupiĝo pri rusa lingvo ne regas ĝin —, la aktiva scio de iu ajn fremda lingvo estas privilegio de ege malvasta tavolo de la societo, ties privilegio, kiuj havas specialajn eblojn por praktiki la fremdlingvan paroladon. Oni vane klopodas kaj klopodos, ke tiu privilegio fariĝu ĝenerala normo.

En ĉi punkto konekteblas en la logikan vicon tiu diskuto, kiun la verkisto Mihály *Gergely*, ĉefredaktoro de nia revuo iniciatis sur la kolumnoj de *Kritika kaj Látóhatár* (Horizonto). Ankaŭ ĉi tie interatakis du absolute kontraŭaj opinioj, sed pri alia demando: ne temis ĉefe pri instrumetodoj, sed aperis principa propono. Nome: kial ni ne lasas la vanajn klopodojn por instrui unu, du, tri, aŭ plurajn fremdajn lingvojn, kiam prezentas sin por solvi la interkomunikajn problemojn la naŭdek jarojn jam ekzistanta internacia lingvo Esperanto? La disputantoj ĉiuj fervore defendis siajn starpunktojn. La esperantistoj argumentis per dokumenteblaj indikoj kaj per la nesolvebla krizo de la informado kaj interkomunikado, dum la principaj malamikoj de internacia lingvo vicigis ĉiujn jam konatajn — kelkfoje diletantajn —, argumentojn kontraŭ Esperanto, rifutitajn jam far kompetentaj personoj, inter ili la ĉiam modera, objektiva, sed severe sciencema profesoro-lingvisto, Géza *Bárczi*.

La diskuto ne finiĝis, ĉar nenio estas solvita: daŭras la mispaŝoj, la preteratento de la interkomunika krizo. Ni esperas, ke en la futuro la samaj gazetoj kaj ankaŭ aliaj donos ĉiam pli grandan spacon al la daŭrigo de la diskuto.

—vhzs—

---

tiam, kiam la aliaj, decaj homoj forlasas la scenejon. El la lasta kunveno de l'komisiono elfluetis fameto: responde, la maljunega Imre Vidanta rapidpasis por repreni sian argilan pipon. Vi ja ne pipfumas, kial do al vi pipo — diris energie Vidanta. La lavango ekruliĝis. Jam neniu dubis pri tio, ke la fama pajloestingo estis antaŭpreparita ago. Post la okazintaĵoj, kiu emus interparoli kun tiu ruzaĉa, insida, malhonestega fijohano, kiu gajnis kvin mil forintojn pere de l'bonfido de l' Skuiĝanoj? Pro li ni buĉis du ŝafidojn — lamentis la bienetanoj. Preskaŭ ni pafis dek leporojn — diris la ĉasistoj. La studento, por savi la saveblan, por ke li ne estu senhavigita de la vilaĝa stipendio, faris mokpoemon, komenĉigantan jene:

Ĉarradoj rulas, direkton al Skuiĝ',
Antaŭ alveno, disigos ĝin skuiĝ' . . .

Johano Forĝista estis eksigita el la brigadestra posteno. Vi ĝoju, diris la konsilantara estro, ke malgraŭ via suspektinda karaktero, vi povas resti inter ni . . . Johano Forĝista ne ĝojis. Sed li restis en la vilaĝo, ĉar ne havis kuraĝon por foriri aliloken.

Tradukis: Zsuzsa *Varga-Haszonits*

Esperantistoj — kontribuantoj al nacia kaj internacia kulturo

El notlibro de leganto

Konaton renkontante mi ĝojas. Precipe, se la renkonto okazas ekster la kutimaj medio kaj cirkonstancoj.

Apenaŭ mi komencis la mezlernejon, kiam krom la devigaj literaturaj kaj fakaj verkoj mi eklegis freŝan hungaran beletron. Tiel mi renkontis le nomon kaj verkojn de tiutempe juna, aktuale distingigita verkisto: Mihály *Gergely*, kaj samtempe mi ekstudis la rusan lingvon — el la lernolibro de d-ro István Szerdahelyi. Antaŭ pli ol dudek jaroj...

Poste mi kun ĝojo rimarkis ilian nomon inter esperantistoj, eĉ, imponis al mi, ke aŭtoro de Esperanto-lernolibro kaj redaktoro de Esperanto-revuo havas renomon ankaŭ en nacilingvaj fakaj rondoj.

Pasis la jaroj, kaj la kutima medio por ekkoni ilian laboron, renkonti iliajn verkojn — fariĝis por mi Esperantio. En tiu medio debutis (almenaŭ por mi) la tria menciinda aŭtoro: István *Nemere*. Leginte liajn artikolojn kaj novelojn en *Világ és Nyelv* (antaŭe: *Eszperantó Magazin)* mi notis lian nomon; ankaŭ la esperantistaro povas lin rememori krom pro liaj publikaĵoj (HV 76/2, 76/5) kiel lingvoinstruiston de Ĉe-metodo, precipe en Pollando.

Kaj nun okazas alia, por mi agrabla renkonto alikampe. *Könyvvilág* (Mondo de libroj — monata revuo de Unuiĝo de hungaraj libroeldonistoj kaj propagandistoj) raportas pri baldaŭ aperontaj libroj.

Inter tiuj frapas miajn okulojn: tri:

— novelaro de Mihály *Gergely* „Alo, Centra Deĵoro!"

— scienca verko de d-ro István *Szerdahelyi:* „De Babelo ĝis mondolingvo," kaj

— romano de István *Nemere:* „La Tritonaj murdoj."

Könyvvilág promesas aperon de la menciitaj libroj por komenco de aprilo.

Eldonistoj promesas — presejoj decidas — tamen, ĝis fino de aprilo aperis ĉiuj tri libroj. Temas pri hungarlingvaj eldonaĵoj, tiel pli detale



prezenti tiujn por nehungarlingvaj legantoj mi ne intencas, tamen kelkajn vortojn nepre meritas la verkoj ankaŭ ĉi tie.

La libro de d-ro Szerdahelyi estas vera donaco por ĉiu hungara esperantisto aŭ por interesemulo pri la mondlingva problemaro: ĝi estas la unua hungarlingva verko, kiu science priskribas kaj resumas la sciindaĵojn pri la elektita temo.

Ampleksanta pli ol 400 paĝojn, la verko krom enkonduko havas dek ĉapitrojn kaj riĉan liston de literaturo, aldonoj, notoj. Ekde la perantaj lingvoj de antikva epoko ĝis la plej novaj lingvoplanoj; de diversaj pazigrafioj ĝis internacie uzataj signosistemoj, ĉion trovas la legantoj sub konvenaj titoloj. Esperanto havas apartan ĉapitron (VII.: Lingvo de espero) kaj apartajn subtitolojn en aliaj du ĉapitroj, sed preskaŭ ĉe ĉiu pritraktita lingvoprojekto staras frazmodeloj ne nur en la koncerna lingvo, sed ankaŭ en Esperanto.

Tiu fakto rajtigas min esperi, ke tiu ĉi hungarlingva eldono eble estas modelo de la aperonta universitata lernolibro pri interlingvistiko.

Eĉ en unusola vico Szerdahelyi ne esprimas privatan simpation al Esperanto, tamen la tuta verko sugeste atestas pri tio — per objektiveco de scienculo.

Des pli valora estas por ni tiu ĉi libro!

Kvankam estis ankaŭ agrabla renkonto miaparte, mi ne povas nomi surprizo aperon de novelaro de Mihály Gergely. Malgraŭ tio, ke en la lastaj dek jaroj li multe da tempo kaj energio oferis al Esperanto, tamen de tempo al tempo li surskribis sin ankaŭ al la listo de publikantaj hungaraj verkistoj.

Antaŭ du jaroj samtempe aperis de li tri libroj, kaj la nuna jam estas lia 19-a volumo.

(Kvankam, vere, pri la unua jam scias nur malmultaj, la intertempe aperintaj 18 prozaj volumoj — inter ili novelaroj, romanoj, riportaĵ-kolektoj, sociografiaj, respektive sociologiaj verkoj — forgesigis jam, ke li debutis kiel poeto.)

Sur la novaperinta libro staras kiel moto citaĵo el Ĉeĥov:

„La ĉefa afero: ŝanĝigo de l'vivo, ĉio cetera estas senutila."

— kiu bone karakterizas la verkistan sintenon de Gergely ne nur en tiu



ĉi novelaro, sed ankaŭ en lia tuta verkaro.

Nenio eksterordinara ĉe tem-elekto, neniu frandaĵo por literaturaj snoboj, por adeptoj de „pura literaturo", nek unu vico „l'art pour l'art" — Gergely prezentas denson de nia vivo. La herooj de liaj noveloj estas simpatiaj simpluloj de niaj grizaj tagoj, kaj suferas pro tiu tono, kiu povus esti vigligebla. serenigebla per iom da klopodo, per reciproka kompreno, per ĉesigo de indiferento, per pli da humanismo. La subjektiva homamo kaj forta emocio de la aŭtoro havas ankaŭ formalajn signojn: kelkaj el la kolektitaj noveloj estas kvazaŭ dokumentfidelaj priskriboj de eventoj, dum aliaj konsistas el unusola pasioplena frazo, monologo aŭ dialogo — tiuj kaptas kaj tenas streĉa la atenton de la leganto.

La „Tritonaj murdoj" — estas la unua libro de István Nemere, sed sen la karakterizaj trajtoj kaj mankoj de unuaj verkoj. Ĝi estas scienc-fikcia krimromano, t. e. sukcesa alojo de ambaŭ ĝenroj. La eventoj de la romano datiĝas al unua parto de la XXV-a jarcento, ĝis kiam la homaro atingis altan gradon de evoluo ne nur en tehniko, sed ĉiuterene. Landlimojn oni ne konas, la homaro vivas en demokratia internacia komunumo.



Sed altiĝis ankaŭ la nombro de la terloĝantoj — atingis jam 25 miliardojn. Por serĉi por homa vivo konvenan alian planedon startos la intergalaktika kosmoŝipo Triton. Baldaŭ post ĝia reveno tri astronaŭtoj-scienculoj, partoprenintoj de la ekspedicio fariĝas viktimoj de murdo ...

Krom pro siaj kavlitoj en ambaŭ ĝenroj, la libro — ankaŭ pro multaj novaspektaj internaciaj rilatoj prezentitaj — certe trovus legantojn en ĉiu lando. Ĝi meritus ankaŭ esperantlingvan eldonon.

Aŭ ĉu Nemere verkis ĝin jam originale en Esperanto, kaj havas la manuskripton preta?

* * *

Esperantistoj ofte citas nacilingvajn aŭtoritatojn, eminentulojn, eĉ pli-malpli konatajn nomojn el la dua vico, se ili esprimis simpation al Esperanto, aŭ favoran opinion pri ĝi. Tio neniel domaĝas, sed estas same grave, ke ni notu, legu kaj propagandu nacilingvajn sukcesojn de niaj aŭtoroj. Des pli ili meritas nian atenton, ĉar dum verkado de signifaj nacilingvaj verkoj ili ne malpliigis siajn agadojn en Esperantio, ne ĉesis labori por ni.

Kaj nacilingvaj literaturaĵoj de Auld, Boulton, Gergely kaj aliaj verkistoj, sciencaj publikaĵoj de Szerdahelyi aŭ de aliaj scienculoj, elhispanaj kaj elportugalaj tradukoj de Benczik ktp. — se ne senpere, tamen kontribuas al la pli vasta reputacio de Internacia Lingvo, kies aktivuloj ili estas.

— jes —

Modernaj metodoj en la akcident-kirurgio

La Landa Traŭmatologia Instituto nun festis sian dudekjaran jubileon: la akcident-kirurgio estas aparta fako de la hungara sanitaro. Ĝi akiris rapide bonan reputacion en pluraj landoj, kie ĝiaj laboroj kaj rezultoj estas menciataj kiel *„hungara modelo"*. Eksterlandaj traŭmatologoj ofte vizitas por studi la instituton, kies direktoro klarigis al ni, kio estas tiu „hungara modelo":

— Tiu esprimo aludas eble al tio, ke niaj kuracmanieroj fontis ne el la ortopedio, kiel aliloke, sed el la ĝenerala kirurgio. Nia instituto kuracas ne nur traŭmatojn de la membroj aŭ mov-organoj, sed ankaŭ difektojn de ventro, torako kaj kranio. Ni progresis precipe en kuracado de traŭmatoj de la mano kaj de la brusto. Prof. *Manninger* ekuzis modernajn metodojn, por la man-kirurgio. Per pluretapaj operacioj, postulantaj egan paciencon kaj de la malsanulo, kaj de la kuracisto, ni redonis laborkapablon jam al miloj de difektitoj. Ĉiujare pluraj centoj de kirurgoj en- kaj eksterlandaj partoprenas pluperfektigajn kursojn, lernas niajn metodojn.

— Ni atingis elstarajn rezultojn per osto-rektigaj opercioj, per anstataŭigo de ostoj per plastoj; en ĉ. cent okazoj ni sukcese anstataŭis la tutan koksartikon per protezo. Poste la instituto sekvas ankoraŭ longe la sorton de la pacientoj, kiuj ofte bezonas ankoraŭ sanitaran *rehabilitadon,* helpe de tiucela ambulatorio. Dum la du jardekoj ni kuracis 115 mil malsanulojn, la nombro de la operacioj superis 70 mil! Tre granda nombro, kio bezonas pli kaj pli da bone kvalifikitaj traŭmatologoj, krome tion, ke el inter la ĝeneralaj kirurgoj de la diversaj regionoj pli multaj partoprenu traŭmatologian pluperfektigon. En Budapeŝto funkcias krom ni pli ol dek traŭmatologiaj sekcioj (650 litoj), en provinco 30 sekcioj (1800 litoj). Ĉio ĉi kontribuis al la bonaj rezultoj: ni atingis dum la du jardekoj, ke la mortalitata proporcio ĉe gravaj damaĝoj de brusto *falis je la duono.* Ni havas similajn rezultojn koncerne la kuracadon kaj rehabilitadon de tiaj man-difektitoj, kies granda parto antaŭe iĝis invalido. Ĉio ĉi kune konsistigas la t. n. „hungaran modelon", kio vekis tiom la intereson de fakuloj en pluraj landoj pri la hungara traŭmatologio.

Tr. István *László*



Infanportreto de Z. Fejér

La ĉi-jaran Gutenberg-premion ricevis G. Haiman, profesoro de tipografio en la Hungara Artindustria Altlernejo, kaj H. Schuster, estro de la Arta Libroeldonejo en Leipzig. La premion fondis la Urba Konsilio de Leipzig, kaj oni aljuĝas ĝin ĉiujare okaze de internacia arttipografia ekspozicio. Pli ol dek mil belegaj libroj el 71 landoj estis ĉijare eksponitaj; Hungario prezentis 250 librojn kun granda sukceso.

Mini-libretoj, albumoj

panoramo

En la komenco de la 20-a jarcento ekestis en Hungario intelekta renoviĝo, prospero de literatura kaj kultura vivo. La fama revuo *Nyugat* (Okcidento) aperis en 1908, kun artikoloj de *Ady* kaj *Ignotus*. Tiu revuo disvolvis la hungaran literaturan movadon, al kiu aliĝis multaj verkistoj, inter ili *Móricz*. D-ro L. *Basch* estis unu el la subtenantoj de tiu revuo, kaj en sia testamento li heredigis la propran domon al la Literatura Muzeo „Petőfi". Oni nuntempe inaŭguris en Budapeŝto la memormuzeon de „Nyugat", kies riĉa kolekto vekas grandan interesiĝon en la rondo de literaturemuloj.

* * *

En kadro de la Hungara-Kuba Kultura Kontakto, okazis en Havano kulturaj tagoj pri Hungario kun granda sukceso. Estis prezentitaj hungaraj filmoj, muzikaj, literaturaj, belartaj kreaĵoj, la ensembloj Hungarica Camerata, Fonográf kaj Express la Baleth̃oro de urbo Pécs. La koncerto de la Havana Simfonia Orkestro kiun dirigentis Gy. Németh, konsistis el hungaraj komponaĵoj. La filmo Árvácska (Orfineto) de verkisto Móricz, same la lirikaj kaj prozaj verkoj, prezentitaj dum la literatura vespero, tre plaĉis al la granda publiko. Oni malfermis ekspozicion pri verkoj de hungaraj pentristoj, skulptistoj, numismatikistoj kaj medalfaristoj. Pli ol 1400 hungaraj libroj, multaj infandesegnoj estis elmontritaj. Dum la kultura semajno la Kuba radio kaj televido dissendis hungaran programon.

* * *

Zoltán *Kocsis*, la konata juna hungara pianisto ludis la koncerton — Es-maĵoran de *Beethoven* en Bratislava, anstataŭ la malsaniĝinta S. *Richter*. La grandsukcesan koncerton dirigentis la slovaka Zdenek *Košler*.

* * *

Ádám Fischer iĝis kapelestro de „Badisches Staatstheater" en Karlsruhe. La juna hungara artisto antaŭe dirigentis en la Operdomo de Helsinki. Okaze de lia foriro, la finna ĵurnalo „Sanomat" publikis longan analizon pri la prezento de Manon Lescaut, kiam „... Fischer ardigis la operon de Puccini".

* * *

La ĥoro de la hungara Arta Ensemblo de Ferlaboristoj *(Vasas)*, kiun dirigentis L. *Vass*, gajnis la duan kaj trian premiojn en Irlando. En la urbo *Cork* oni aranĝis internacian folklor- kaj ĥorkoncerton, kie la ĥoro, krom la menciitaj premioj, ricevis ankaŭ apartan premion „Por la plej elstara prezentado".

* * *

„Rigardo al Hungario" estis la titolo de ekspozicio en la Sud-Aŭstralia urbo *Adelaide*. La ekspozicion malfermis la ĉefministro de Sud-Aŭstralio, D. A. *Dunstan*, ĉeestis ĵurnalistoj kaj raportistoj de radio kaj televizio.

* * *

Intense pligrandiĝas la ekonomiaj rilatoj inter Hungario kaj Japanio. Antaŭ nelonge la vicministro pri metalurgio kaj maŝinindustrio, I. Littvai faris komercan traktadon pri elektraj aparatoj, poste s-ino Keserü, ministro pri malpez-industrio gvidis delegacion al Japanio. Estas karaterize pri la japana ĝentileco, ke apud Kioto en grandega teks-fabriko estis ĉie videblaj hungarlingvaj sloganoj: „Ni ege ĝojas kaj dankas, ke vi venis al ni. Ni petas vin, bonvolu tute trarigardi nian fabrikon." Dum la du-mil km-jn longa veturo okazis simila akcepto en Jokohama, ĉe la plej granda presejo de la mondo, Dai Nippon Ink, kie laŭdire oni presas — krom akvo kaj aero — sur ĉiun materialon. La delegacio vizitis sur insulo Šikoku grandegan fabrikon de artefaritaj silkoj. La tuta vizito estis fruktodona por la modernigo de la hungara malpeza industrio.

panoramo

La hungara folklora arto estas bone konata eksterlande. En nia lando funkcias 72 hejm-industriaj kooperativoj de 40 mil popolartistoj, kiuj tra jarcentoj heredis la sekretojn de la tradiciaj produktaĵoj. Precipe konendas la specialaj materialoj kaj metodoj de la preparado. De Tokio ĝis Ŝtokholmo, de Sanfrancisko ĝis Ateno estas aĉeteblaj la hungaraj folkloraj produktaĵoj. Pasintjare la produktiva valoro atingis 3 miliardojn da forintoj. La sortimento: brodaĵoj, permanaj teksaĵoj, lignoskulptaĵoj, ceramikaj potoj, korboj el salikvergoj kaj krikoj, ludiloj kaj mebloj, mane-noditaj tapiŝoj. Ne ĉiu ajn konvenas por tia laboro, nur kiu havas sufiĉe da arta kapablo. La Konsilantaro pri Folklorartaĵoj konstante kontrolas la produktaĵojn, kaj kune kun la Instituto por Kulturaj Rilatoj aranĝas eksterlanle ekspoziciojn. Tiamaniere estas certigita la eminenta kvalito de ĉiu eksponita varo.

* * *

En la historio de l'homaro ĉiu epoko havis sian karakterizan malsanon. Iam la pesto kaŭzis teruran eksterrmon, poste la mizero faris la tuberkulozon popolmorbo. Nuntempe la civilizacio, la ekcesa vivoritmo produktas la kormalsanojn. Laŭ la sanitara statistiko 99% de l'homaro suferas je kario, kaj apenaŭ estas trovebla iu havanta sanajn dentojn. Krome ĉiam atakas la plej insidema malsano, la kancero. Laŭ atesto de la historio, fine la homo trovas la antidoton kontraŭ ĉiu danĝera malsano. La Societo de Hungaraj Onkologoj kaj la Internacia Kanceresplorista Simpozio komunie aranĝis en Budapeŝto tritagan konferencon, kiun partoprenis 250 scienculoj el la kvin kontinentoj por la nobla celo, la komuna afero de la tuta homaro.

* * *

En urbo Nagykanizsa, en la centra kulturdomo juna japano paroladis al la publiko hungarlingve: Hukaja Ŝitoŝi, naskiĝinta en Tokio. De 6 jaroj li studas en la Scienca Universitato „Eötvös" la hungarajn lingvon kaj literaturon, Esperanton kaj ĝeneralan lingvistikon. Li estis 14-jara kiam komencis esperantlingve korespondi kun hungara fraŭlino, kaj tiu interrilato instigis lin interesiĝi intense pri Hungario, eĉ ellerni ties lingvon. Li trovas la hungaran lingvon logika kaj facila, ĉefe por mongoloj, turkoj kaj japanoj, kiuj cetere kun granda peno lernas la anglan. Lian aserton konfirmas lia flua parolado kaj perfekta prononco. Hukaja Ŝitoŝi multe vojaĝas en Hungario por esplori la dialektojn. Li havas jam multe da hungaraj libroj, kiujn li trastudis. Post la hejmeniro li ŝatus instrui la hungaran lingvon en iu universitato, kaj kiel tradukisto konigi la hungaran literaturon al la japanoj.

* * *

Jubileas la *Hungara Filatelista Asocio,* kiu fondiĝis antaŭ 25 jaroj. La asocio havas 180 mil anojn: de laboristoj ĝis scienculoj ĉiu socia tavolo estas en ĝi reprezentata. En Budapeŝto funkcias 867 rondoj (krome 231 por junuloj) kun 80 mil anoj. En provinco troviĝas 1300 rondoj (krome ĉ. mil por junuloj). La filatelistoj kolektas ĉefe hungarajn poŝtmarkojn; palsintjare ili aĉtlis en la valoro de preskaŭ 50 milionoj da forintoj. De 1963 oni ĉiujare organizas ekspozicion: ĉi-jare en Berlino, venontjare en la hungara urbo *Szombathely* okazos la internacia ekspozicio.

Komp. Szilárd *Bálint*

Čarfaristo — foto de János Eifert

Punto el Halas



Literatura metiejo

Por pli belstila prozo

Zamenhof skribis iam: „...unu (verkisto) skribas en bela, facile komprenebla lingvo; la aliaj, kontraŭe, kutimiĝis al maniero esprimadi la pensojn tiel, ke oni bezonas iafoje tre longe pripensadi la frazon, por kompreni ĝian sencon. Kvankam tia perfekta fleksebleco, kiun posedas E-o, estas sendube tre kara eco, ĉar ĝi permesas al ĉiu skribanta enmeti en la verkon sian propran individuecon, difinantan la stilon —, sed en la sama tempo tiu ĉi eco prezentas... ankaŭ *ne malgrandan danĝeron,* ĉar ĝi *donas la eblon malbonigi la lingvon.* Jen al tiu ĉi danĝero devus la E-istoj turni sian atenton..." (miaj substrekoj, F.).

Tiu averto validas ankaŭ nuntempe: multaj estas la manuskriptoj en la redakcioj, kiuj postulas la helpeman — foje drastan — plumon de la redaktoroj. Oni devas pli bone konscii, ke produkti prozan tekston, artikolon — originale aŭ traduke —, por ne paroli pri la „alta literaturo", ne estas ia tutsimpla kaj ekstreme facila afero. Ni intencas nun per kelkaj konsiloj kaj admonoj instigi la proze verkantojn: *formu vian stilon kiel eble plej klara kaj konciza, igu ĝin eleganta!* La sekvaj vicoj enhavas — iom krudajn — ekzemplojn de variadoj (en parentezoj): ***bonvolu*** preni ruĝan krajonon por marki (streki) la pli konvenan (plaĉan, taŭgan, esencan) el inter la variantoj (modifoj, vari-eblecoj, alternativoj ktp.); certe vi elektos foje iun alian: notu ĝin marĝene!

Nuntempa leganto kutime apenaŭ havas (dediĉas, oferas) longan tempon (paciencon, emon, inklinon) por finlegi ĉion presitan, eĉ se la temo al li plaĉas (konvenas, vekis la intereson).

Malklaraj esprimoj, neniodiraj „frazo-paneloj", ne-necesaj ripetoj (taŭtologioj, pleonasmoj — vd. en iu ajn leksikono) certe enuigas (tedas, lacigas) la celitajn legantojn. Superfluan (nebezonatan, nenecesan) energion postulas trokomplikitaj frazokonstruoj kaj nacilingvaj esprimmanieroj, precipe malavantaĝaj (misaj, evitindaj) en internacia lingvo. Kompreneble tiujn oni devas alikonstrui (ĝustigi, selekti, korekti, transformi). La stilo de Esperanto devas esti internacie komprenebla, facila, logika, varia kaj eleganta — tion samtempe ebligas kaj postulas la genia strukturo de nia lingvo, tiu senkompara interkomunikilo.

En presita teksto — multe pli ol en la parolo! — la pensoj de la verkanto devas ricevi ĝustan (adekvatan, kompreneblan, trafan plezurdonan) lingvan formon (veston, kostumon, prezenton), konvenan al la kunteksto, al la stila nivelo kiun bezonas mem la temo. Oni atentu bone la ĉie validan lingvistikan leĝon: vortoj kaj frazoj *ne prezentas* (interpretas, komunikas) *en ĉiu kazo* klare kaj signifoplene niajn ideojn! Esprimi sin tiamaniere, ke malgraŭ tio la efiko estu kiel eble plej kompleta, la pensoj pleje interpretataj lingve — restas la devo de la verkanto. Kaj despli se li tradukas pensojn de alia.

Ni prenu nun ordinaran gazet-informon por meti ĝin sub lupeon:

„Oni malfermis ekspozicion pri E-reklamiloj en la Bervala fama urbodomo. La ekspozicion aranĝis la Bervala E-klubo, kaj la sukceson montras, ke venis multaj Bervalanoj rigardi la lerte grupigitajn belajn reklamilojn..."

Jen *grizeco* kun troaj ripetoj; sensalaj adjektivoj (bela fama, lerta), kiuj apenaŭ sugestas ion. La malfermo estis la grava, ĉu? Ni klopodu formi la sciigon konciza, iomete pli leginda:

> *"Ekspozicion pri E-reklamiloj* aranĝis en la Bervala urbodomo la loka E-klubo. La multfaceta materialo favore impresis la aron da vizitantoj..."

Por analizo: el 6 verboj restis nur 2; ripetoj (Bervalo, ekspozicio) forestas; la esenca fakto ricevis sian pozicion ĉekape.

> „En la nomo de la urba konsilantaro de Bervalo, s-ro d-ro Elvid Turo urbestro, kiu estas ankaŭ parlamenta deputito, diris dankon, dezirante pluajn sukcesojn al la klubo. Li petis ilin aranĝi ekspozicion ankaŭ pri E-aj gazetoj kaj revuoj..."

Hm, la redaktora ruĝa krajono devas plulabori por forigi la multajn epitetojn de la honorinda Turo, kvankam alta persono; krome ĝenas la tumultantaj d-sonoj, ties aliteracio nun ne havas rolon. Do restu:

> „D-ro Elvid Turo urbestro kaj deputito salutis la sukcesajn klubanojn, kaj proponis elmontri venonte la E-periodaĵojn de ĉiuj kontinentoj..."

En artikolo pri verkisto ni renkontis tro fidele — servutule — tradukitajn *nacilingvismojn:*

> „Lia unua memstara libro aperis en la ĉefurbo de Hungario, en Budapeŝto, kies titolo estas: „Scenoj el la pli grandaj uzinoj" Li komune verkis kun sia kunaŭtoro Bro Kato la plej freŝan romano-volumon sub la titolo: „Briketo..."

Bedaŭrinde ekzistas bone konataj ĵurnalismaj manieroj por abundigi la malmulton per longigaj vortoĉenoj. La tradukanto devas tiaspecajn skribaĵojn unue *transformi* en la racian komun-lingvon, kaj precize kompreni la direndon, ja nur la esenco estos akcentenda!

Enestas nebulaj esprimoj, miskompreneblaj *(memstara?)* krome ĉiuspecaj naciismoj. Anstataŭ spegule traduki tiujn, oni devas trovi la plejeble adekvatan, internacie kompreneblan esprimon.

„Memstara libro" volis signifi: „aparta volumo", t.e. ne kolektaĵo de pluraj aŭtoroj. La komparativo „pli grandaj uzinoj" estas regule uzata en la hungara en absoluta senco: ekz. por ia meza grado sen kompara rilatigo: sed tiu uzmaniero ne estas „eksportebla" en alian lingvon. Ankaŭ tio montras la gravecon koni profunde, pli kaj pli subtile la propran, gepatran lingvon! En nia ekzemplo troviĝas ankaŭ superfluaj ripetoj — normala en la *parolo,* —, tamen *en skribaĵo* la bona gusto tendencas eviti ilin. Post aliformigo de la *hungara* originalo ni tradukas ĝin en nian lingvon:

> „Lia unua libro aperis en Budapeŝto: „Scenoj el uzinoj". Oni presas jam la novan romanon de la juna verkisto: „La eta briko", kiu enhavos multajn ilustraĵojn de Bro Kato..."

Utila kaj praktika metodo: antaŭ verkado *kolekti* vorto-stokon, karakterizantan la temon, el la plej oftaj nocioj, verboj k.s. helpe de bonaj vortaroj. Tiuj kutimas aludi al parencaj kaj sinonimaj vortoj, esprimoj, al konsidereblaj terminoj, do per iom da peno oni rapide havas ĉemane fakajn aŭ specialajn vortojn por elekti, gustumi la plej konvenajn dum la kontinua verkado. Grandaj verkistoj daŭre utiligas vortarojn *de sia gepatra lingvo* (Grande Dictionnaire, tn. Klarigaj Vortaroj, k.s.) sentante profundon bezonon ĉerpi el la lingva trezoro de la leksiko kaj esprimaro.

Ervin *Fenyvesi*

Barbara Sokalówna:

La telefono

Venis al mi telefona teknikisto. Li alportis aparaton, novan, modernan, viol-bluan. La malnovan, nigran, iom rompitan li metis en sian tekon.

— Mi ne plu riparos ĝin — li diris.

— Vi riparos la novan...

— Ne, ne plu mi. Vi apartenas nun al alia centralo. Kaj ne forgesu, sinjoro, ke via numero estas ŝanĝita. Mi skribis sur la ŝildeto.

— Kaj mian ĝisnunan numeron havos iu alia?

— Neniu. La numeron 11-33-77 ni likvidis.

— Do, se iu, ne sciigita pri la ŝanĝo provos aŭdigi tiun malnovan numeron...

— Ĝi ne respondos. Estu trakvila. Ĝis revido, sinjoro.

Mi ne estis trankvilla. Ŝajnis al mi, ke mia iama telefono ankoraŭ ie funkcias, ke mi devas tuj alvoki ĝian numeron. Mi eksidis ĉe mia nova, viol-blua aparato kaj mi turnis: 11-33-77. Eksonis la signalo, tute normale. Poste aŭdiĝis vira voĉo, bone al mi konata.

— Fine, mi atendis vin.

— Do, mi estas.

— Kelkajn minutojn ni povas interparoli, poste — ŝi venos.

— Ne, ŝi ne venos. Ne atendu ŝin.

— Ŝi promesis veni.

— Unu mensogo pli, unu malpli...

— Ŝi ne mensogas. Ŝi venos, por priparoli la nupton.

— Mia olda, forgesu pri tiu knabino. Ŝi estas egoisma, sufiĉe stulta, kaj eĉ ne tre bela. Tro magra, kaj iom ŝi strebas. Forgesu, mi diras.

— Ne, ne! Ŝia naiveco estas tiel natura, ŝia egoismo tute senvola, kaj la okuloj kun tiu eta strabo — eĉ pli ĉarmaj. Ŝia malperfekteco kortuŝas min. Cetere, ŝi promesis al mi pliboniĝi. Mi devas nur helpi al ŝi...

— Idioto! Mi diros al vi... Mi diros, kion mi scias. Nur venu, mi ĵetos la tutan veron en vian stultan buŝaĉon!

— Bone, mi iras.

En la telefono aŭdiĝis forta krako.

— Jen, mi estas.

Mi viŝis la okulojn. Li staris antaŭ mi. Tiu bonkora, trista vizaĝo... Mi eksentis malamon.

— Kreteno! — mi ekkriis — Kreteno! Via damo estas simpla...

Mi ne finis. Li vangofrapis min forte. Mi redonis la baton. Ni luktis impete kelkajn minutojn. Ni falis teren pro laciĝo. Ambaŭ, sammomente. Tiam aŭdiĝis la sonorileto ĉe la pordo kaj envenis... ŝi.

— Bonan vesperon, Henĉjo — ŝi diris — ho, vi havas gaston.

— Ŝi venis, vidu, cinikulo — li triumfis.

— Ho, kiel vi similas unu al la alia... Henĉjo, kial vi neniam diris, ke vi havas ĝemelan fraton — ŝi ridetis kokete, en ŝiaj okuloj brilis variaj fajrejoj. Fakte, tiu eta strabo ne estis manko... Ŝi rigardis min alloge.

— Ne rigardu lin tiel — li protestis — Li estas cinika kaj brutala. Tute alia, ol mi. Kiam la nupto?

— Morgaŭ, je la kvina posttagmeze. En la Palaco de Nuptoj. Mi invitas vin ambaŭ.

,— Vi... invitas — li preskaŭ svenis.

— Jes, mi kaj mia fianĉo, Rikardo.

— Rikardo! — ni ambaŭ ekkriis — Tiu lekulo, karieristo!

— Estos al ni agrable vidi vin ambaŭ, sinjoroj ĝemeloj.

— Ni ne estas ĝemeloj, Krinjo, mi klarigos al vi... Kaj ĉesu ŝerci... — li provis tuŝi ŝian manon.

— Vi ne estas ĝemeloj? Do, vi estas simple du Henĉjoj. Des pli interese. Jen, la invitilo. Ne forgesu veni. Ĝis morgaŭ.

Ŝi eliris. Ni silentis. Li tenis en la mano la blankan kartoneton, rigardis ĝin, poste ĝin disŝiris je pecetoj.

— Vi... vi pravis — li diris.

— Jes, mi pravis, sed mi komprenas vin. Ŝi estas bela.

Li ekploris. Mi cirkaŭbrakis lin konsole. En mia brakumo li fariĝis pli kaj maldika, diafana, fine jam li similas al ombro, al aero. Mi enspiris lin.

Mi volis akiri la certecon pri tio, kio okazis. Denove mi eksidis ĉe mia viol-blua telefono kaj mi provis voki la numeron 11-33-77. Vane. Ĝi ne respondis.

— Bone, mia olda, — mi diris — ni solenos la hodiaŭan vesperon. Ni amuziĝos.

Mi iris al restoracio, konata pro bona muziko kaj ĉampana agordo. Ĝi estis jam plena da gastoj. Mi preterpasis la dancrondon kun gejunuloj, frenezantaj laŭ viglega, ekzota ritmo. Mi eksidis ĉe la bufedo. La bufedistino manovris per boteloj kaj kalikoj. Unu el ŝiaj manoj estis vindita.

— Kio okazis? — mi flustris. Aŭ eble, li tion diris... Ŝi ne aŭdis, feliĉe.

— Mia olda, ni ĉesu kun tiu kompato por virino — mi proponis.

La bufedistino proksimiĝis.

— Kion por vi, sinjoro?

— Vodkon mi petas, duoblan.

— Ĉu vi estas jam dekokjara? — ŝi hezitis.

— Dudekdujara. Kaj ni estas du. Sume: kvardek kvar jaroj.

— Jam ebria! — ŝi flustris kun malaprobo kaj ŝi donis al mi kalikon. Mi levis ĝin.

— Je via sano, mia olda!

— Je la via — li respondis el mia interno kaj tuj li ekdormis. Nenio miriga. Li travivis multe tiun tagon... La orkestro ludis ion pasian. ekzotan, ekscitan. Krinjo kaj ŝia morgaŭa nupto malproksimiĝis, malaperis en malrealeco. Mi eksentis min malpeza, libera, feliĉa.

Medioprotektado en Hungario

Multflankaj klopodoj por evoluigo kaj protektado de Balatono kaj ĝia ĉirkaŭaĵo

D-ro Ferenc László

II.

Protektado de la bordo

La reguligo de la borda konturlinio kaj problemo de bordoprotektado leviĝis unuafoje ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo, kiam komenciĝis la invado de somerumantoj kaj konstruado de somerdomoj sur la ĉirkaŭaĵo de la bordo. Antaŭ konstruado de la unua ligna kluzo de Ŝio (1863) la nivelŝanĝiĝo de lagsurfaco atingis pli ol unu metron. Depende de la pluva aŭ seka vetero la ondobatoj atingis la bordojn formantajn sabloaltiĝojn, aŭ superpasis tiujn, kaj tiam la plantaĵoj de la boskoj, kaj la kanejoj foruzis ilian detruigan energion.

En la jaroj post 1880, kiam komenciĝis la baneja vivo, pro manko de ordigitaj bordoj la superakvaj bandomoj kaj vestadbudoj estis konstruitaj sur enakvaj fostoj. La vintraj glacioj kaŭzis kompreneble multan damaĝon. En *Siófok* oni konstruis la bandomojn tiel, ke ili estis forigeblaj por la vintra sezono. La bordprotektaj digoj de la komenco de nia jarcento ĝis la tridekaj jaroj estis konstruitaj laŭ diversaj tipoj, kelkaj estis uzeblaj dum jardekoj.

En la tridekaj jaroj estis konstruitaj tipoj de modernaj bordoprotektiloj. Tiuj pretiĝis el ŝtono, betono, aŭ el blokŝtonoj, krudaj ŝtonoj, kaj kunigis avantaĝojn de la antaŭaj sistemoj, estetike jam prezentis neriproĉeblan solvon, kaj ilia vivdaŭro estis multe pli longa. Tiuj konstruiĝis en malprofunda akvo proksime al la bordo, kaj tiel ili helpis la fiksigon de deŝireblaj bordopartoj.

Ĉe Balatono la reganta ventodirekto estas nordnordokcidenta, pro tio la ondobatado atakas unuavice la sudan bordon. Ofte blovas la vento ankaŭ de sud-okcidento, sed tiuj ventoj ĝenerale estas pli malfortaj, daŭras malpli longe kaj kaŭzas mapli grandajn damaĝojn en la larĝaj kanejoj de la norda bordo.

Antaŭ nelonge oni opiniis, ke la alteco de la ondobatoj ne superas unu metron en la neprofunda akvo de la lago. Tamen la esploradoj per la mezurinstrumentoj pruvis, ke sur la akvosurfacoj, levitaj per la laŭlongaj kaj transversaj akvobalanciĝoj povas formiĝi eĉ du metrojn altaj ondoj. La ondbatadoj formiĝantaj pro ŝtormoj kaŭzas grandajn damaĝojn sur bordoj neŝirmitaj. La mezgranda bord-erozio povas fariĝi jare po unu metro.

La ondobatado atakanta la bordojn, resp. la bordŝirmantajn konstruaĵojn rezultas plurajn detruojn. La batforto de la ondado disigas la senŝirmajn bordojn, aŭ suprenirante sur la dekliva surfaco de la ŝirm-digo filtriĝas en la grundon. Pro la suĉefiko de la retiriĝanta ondo la filtrado povas tiom akceleriĝi malantaŭ la ŝirmdigo, ke tio disigas la grundon, kaj la kreitaj kaviĝoj malutilas al la konsisto de la borda ŝirmdigo. La refalanta akvoamaso akceliĝante sur la akvoflanka deklivo kaŭzas erozion ĉe la bazlinio de la digo.

Krom la ondado ni devas unuavice priatenti la efikon de glaci-moviĝo. Balatono tutsurface glaciiĝas ĉiuvintre, meznombre dum 50 tagoj kovras ĝin kontinua glacikovraĵo. Sekve de la malprofundeco de la akvo, la glacio tre rapide dikiĝas, en severaj vintroj ne estas malofta la glacikiraso de 50—60 cm-a dikeco.

La relative rara statika glacipremo, naskiĝanta el dilatiĝo de glacio, kaŭzas tre grandajn malutilojn. Ĉi tio efektiviĝas precipe tiam, kiam la glacikovraĵon ne disrompas en pluraj direktoj kun laŭtega tondrado la kreviĝoj (*„rianás"*), kiujn kaŭzas la internaj premoj, tensioj estiĝintaj pro la temperatur-diferencoj dumtagaj kaj dumnoktaj.

Multe pli ofta, ol tiu statika premo, estas la dinamika glacipremo, kiu komenciĝas kun la tumultiĝo de la rompitaj glacitavoloj. Se kune kun la degelado aperas tempesta vento, tiu pelas la disŝirintajn glacitavolojn al la bordoj. La glacitavoloj puŝiĝantaj al la bordo, aŭ borda ŝirmdigo glitas, premiĝas unu super la alia, ne malofte ĝis alteco de 2—3 metroj.

* * *

Decide influas la formadon de la bordŝirmaj konstruaĵoj la ebleco de elekto de la fundamentadmaniero, respektive tiu cirkonstanco, ĉu la borda muro estas konstruata sur la suda aŭ norda bordo.

La sudan bordon karakterizas la 70—150 cm-jn dikaj sablogrundoj devenantaj de erozio. Sub tiu lokiĝas diverskompaktecaj tavoloj de panoniaj* materioj. Sur tiu bordo ne estas fundamentadaj problemoj, oni devas ŝirmadi nur kontraŭ kaviĝado kaj lav-erozio.

Sur la norda bordo estas karakteriza la maldense likva ŝlimo, sub kiu alternas kalkŝton- kaj sabloŝton-benkoj.** Se oni devas konstrui la ŝirmverkon en kanejo, oni devas kalkuli anstataŭ likva ŝli-

Moleo ĉe Siófok en januaro.

mo kun pli kompakta ŝlimtavolo traplektita dense per kanradikoj. Laŭ la konsisto kaj dikeco de la ŝlimtavolo estas necesa la ŝanĝo de grundo aŭ enkonstruado de ŝarĝodistribua tavolo.

La bordŝirma verko devas kontentigi ne lastavice estetikajn pretendojn. Ja la bordŝirmilo estas tuj okulfrapanta teknika kreajo, kiu determinas la fizionomion de Balatono. Ĝiaj konturoj devas harmonii kun la pejzaĝo, ke ili ne efiku kiel fermita betonbaseno je la sensoj de la tien venanto. Oni devas atenti ankaŭ la pretendojn por sinbanado, naĝado.

La grandmezuraj bord-ŝirmaj konstruadoj, — ekirintaj en la sesdekaj jaroj, — havas krom siaj rektaj ŝirmad-celoj, ankaŭ alian gravan taskon. Sur la suda bordo oni devas plani la horizontalan linion de la ŝirmkonstruaĵoj tiel, ke tiuj situu ne sur tiu bordparto, kiun la tiutempa efektiva situacio prezentas post multjardeka erozio de la ondado, — sed en 100—200 metra distanco en la lago. La tie konstruita bord-muro ŝirmas la bordon ne sole kontraŭ la ondobatado, sed rezultas ankaŭ signifan areo-konkeron. Nome oni plenigas la areon inter la nova bordmuro kaj la momenta, — pro erozio formiĝinta bordlinio — per materio akirita el la lagokuŝejo. Tiel oni rekonkeras valoran terenostrion de Balatono, sur kiu teritorio malfermiĝas ne sole novaj baniĝeblecoj, sed estas formebla la unueca laŭborda promenadejo, kaj loko por novaj hoteloj, refreŝigejoj. Per la nova reguliga linio oni restarigas propre la originalan bordkonturon de Balatono, kiun la akvo forigis dum la pasintaj jardekoj.

Dum la jaroj inter 1945—1959 estis konstruita, rondcifere 10 km-jn longa, bordŝirma verko, kaj en la sekva jardeko oni reguligis jam pli ol 20 km-an bordsekcion. Nuntempe konstruiĝas jare po 3 km-a longeco nova bordmuro, kies tuta longeco jam estas preskaŭ 50 km-a.

Malantaŭ la ĝis nun konstruitaj bord-ŝirmiloj estas jam apud la lago 100 hektaroj de reakirita tereno.

Kiel menciite, la longeco de Balatona bordo es-

**Panonio:* iama Romia kolonio, sur teritorio Hungaria inter Danubo kaj Dravo. *Panonia etaĝo:* formacia etaĝo de plioceno.

***benko:* benkforma elstaraĵo en akvo, en grundo.

tas 195 km-a, la perspektivaj planoj antaŭvidas bordŝirmajn verkojn en longeco de 125 km. Sur la suda bordo la kanejoj kaj iom altaj bordoj prezentas nur etan ŝirmadon, tial oni devas tie konstrui la ŝirmdigojn sur bordsekcioj longe kontinuaj. Sur la norda bordo la ampleksaj kanejoj kaj kontraŭ ventoj ŝirmitaj bordsekcioj havas pli grandan sekurecon, kaj tial tie konstruiĝas pli mallongaj bordmur-sekcioj.

Dum la evoluigo oni planas la reniveligon de pr. 800 hektaroj da tereno reakirita de la lago.

La konstruado de bordmuroj kaj reniveligo de la teritorioj malantaŭ la digoj estas plurcela, kompleksa tasko. Tio malhelpos pluan bord-forŝoviĝon kaj la ŝlimiĝon koneksan kun translokiĝo de la bordo, reakiras terenojn, pli frue forrabitajn far la lago, — plibonigas, agrabligas la banadon, refreŝigan sanan vivon.

Aranĝado de akvokolektejo de Balatono

Organike kunligitan akvomastrumadan unuon formas la lago kaj ĝia akvokolektejo, kiuj strikte, reciproke efikas unu sur la alian. La grundkultura sistemo aplikita sur akvokolekta teritorio, reguligo de riveretoj, riverkuŝejoj, limigo de la akvoeroziejoj influas la akvokvanton fluantan en la lagon.

La tuta akvokolekta teritorio estas eroziema. La pluvoj povas erozie efiki precipe sur la iom loza sablo — kaj argilgrundoj. Rigardante la deklivcirkonstancojn, duono de la akvokolektejo apartenas al la kategorio 0—50%-a, sur dekona areo superpaŝas la deklivo 25%-jn.

Akvorezervujo ĉe Zámoly



La aranĝado de la akvokolektejo pretendas multfacetan laboron. Solvendas — unuavice sur apudbordaj teritorioj — forkonduki la nocajn akvojn el la platregionaj golfetoj, reguligi la riveretkuŝejojn kaj tiujn de aliaj akvofluoj, fine oni devas zorgi pri la aranĝado de akvofluoj sur deklivoj, kaj pri sirmado kontraŭ ties erozio.

El la tuta akvokolektejo estas 500 km^2 da areo koneksa kun Balatono kaj 200 km^2 da areo apud la rivero *Zala*, kiuj teritorioj bezonas ebenaĵan aranĝon de la akvoj. Meze de la pasinta jarcento sude de Balatono estis grandaj teritorioj kovritaj per surgunda akvo kun boskoj, arbustejoj, kies akvosurfaco estis kunligita kun la lago. En tiu tempo jam de 50 jaroj funkciis iom post iom akvoreguligaj kaj kanalizaj asocioj por reguligo de diversaj akvofluoj, riveroj. Baldaŭ evidentiĝis tamen, ke la senakvigo de la suprenomitaj akvokovritaj boskoj, kaj reguligo de la Balatonon nutrantaj akvofluoj ne estas solvebla individue sen la ĝenerala aranĝado de la laga teritorio.

La reguligo de kanalo Ŝio kaj de akvofluo *Sárvíz*, — kuniĝanta kun ĝi por konduki la lagakvon al Danubo, — faris malaltigebla la akvonivelon de la lago. Tiel la 50 km-jn longa apudborda sabla tereno inter *Siófok* kaj *Balatonberény*, — kiun dum jarmiloj la glacitumultiĝoj, ondoj formadis, ŝanĝadis, — fine iĝis seka. Poste ankaŭ la marĉaj terenoj pli sude liberiĝis de la akvoj. Tie oni konstruis kanalaron de preskaŭ 500 km-a longeco por forkonduki kaj uzebligi la akvojn kaj la liberigitan teritorion. Tiu ĉi tereno apartenas al la plej grandaj ebenaĵaj akvoaranĝaĵoj de la lando. Estis konstruitaj sep pumpilarejoj sur la bordoj de la lago por liveri ĉiusekunde po 15 m^3 da akvo. Se la Balatona akvonivelo estis pli alta ol la ĉirkaŭaj rezervujoj, tiuj pumpiloj levas la grundakvojn de la tereno en la lagon. Laŭ la rivero *Zala* konstruiĝis pr. 300 km-a kanalaro. Krom tio oni pretigas ampleksajn drenadajn kaj defluigajn fosaĵojn por reguligo de la grundakva nivelo, precipe sur akvon-tralasanta torfa subgrundo (marĉoreguligo).

Kontinue, daŭre estas necese aranĝi la fluejon de akvofluoj kaj riveretoj. Celo de tiuj laboroj estas malpliigi la inundojn de riveretoj, ŝirmadi la industriejojn, trafikajn liniojn, loĝteritoriojn kontraŭ superakvoj. Krom ĉesigo de fluej-misformiĝoj, estas reguligendaj, pli ol cent malgrandaj akvofluoj, kies longo atingas unu kaj duon mil km-jn. Grava zorgo estas ĉesigo de la valaj erozioj. Sur la akvokolektejo de Zala kaj norde de Balatono konstruiĝis 50 digoj por malhelpado de akvoerozioj, sed necesas ankoraŭ estigo de pli ol cent digoj. Unuavice gravas la barado de la akvodetruadoj sur monto *Badacsony*, ĉar okaze de impetaj pluvegoj la torentaj akvoj danĝerigas la faman vitejon kaj loĝatajn teritoriojn. Simila estas la situacio ankaŭ en ĉirkaŭaĵo de somerumejoj *Keszthely, Révfülöp, Balatonrendes.*



Akvorezervujo ĉe Lázbérc.



Baraĵo de Ŝio.

Strikte aliĝas al la montetregiona akvoreguligo la ŝirmado de deklivaj terenoj, malrapidigo de la eroziaj procezoj. La protektado de grundoj postulas tre vastasferajn laborojn agro- kaj hidroteknikajn, — kaj ilian harmoniigon.

Agroteknikaj farendaĵoj estas: ekuzo de pli ĝusta semad-sistemo kaj de grundokulturado (plugado en ebeno, laŭ samnivela pluglinio sur deklivo, profunda lozigo, ktp.) kaj konvena komasacio. Hidroteknikaj farendaĵoj: konstruado de verkoj por malakceli la malsupren-fluadon de akvo per remparetoj, terasoj, resp. akvo-dekondukejoj, zonfosaĵoj.

La aranĝaj laboroj de deklivaj terenoj servas unuavice la ŝirmadon de la humo, sed nerekte ĝi malpliigas la sedimentojn, direktiĝantajn al la lago kaj naskiĝintaj el grunderozio.

Evoluigo de akvoprovizado

Se ni deziras ĉiurilate kaj sur moderna nivelo plenumi dezirojn, pretendojn de somerumantoj, sportistoj, ekskursantoj, fremdlandaj gastoj, — ni devas nepre solvi la akvoprovizajn, kanalizajn taskojn. Sistema evoluigo sur tiu tereno tre influas la konstruadon de somerdomoj, somerumejoj kaj formadon de refreŝigejoj.

Kun la evoluo de Balatona spaco progresis kune la akvoprovizado. La transpasan postrestadon oni sukcesis ĉesigi kaj per la konsekvenca efektivigo de la evolua programo certigi laŭpretendan kvanton, sur konvena nivelo. (Nuntempe kelkloke eble sperteblaj akvoprovizadaj problemoj aperas izolitaj).

La kapaciton de la akvoproduktejoj oni grandigis, — ampleksigis la akvotubaron kaj estigis pluraj novaj akvodistribuejoj.

Per la evoluigo, la kapacito de la akvodistribuejoj superas la kvanton unutagan: po 10 000 m³/ tago. Komence la evoluigo baziĝis sur la lokaj akvoprovizoj. Pro la rapida kresko de fremdultrafiko kaj de la bezonoj de loĝantaro la akvoprovizado estis jam solvebla nur per regiona akvodistribuada sistemo ampleksanta sur la tuta Balatona spaco. Tio necesigis kreon de tri regionaj akvodistribuejoj:

— Sudorient-Balatona Regiona Akvodistribuejo,
— Okcident-Balatona Regiona Akvodistribuejo,
— Nordorient-Balatona Akvodistribuejo.

Por plua certigo de la ĉiam kreskantaj bezonoj servos ampleksigo de rezervokapacito, kunligo de subcentraloj, ktp. Krome oni devas zorgi pro la kresko de akvoprovizado ankaŭ pri forigo, purigo kaj lokigo de kloakakvoj.

Kanalizado kaj poluakvopurigado

En la refreŝigeja zono ĉirkaŭ Balatono la etendado de la kanalreto komenciĝis jam en la unuaj jaroj post 1960. La belajn rezultojn atestas, ke en ĝia strikta ĉirkaŭajo estis konstruitaj 150 km-ojn longa kloakkanalaro kaj 17 poluakvo-purigejoj.

Antaŭvidebla estas plua rapida evoluo de la tuta ĉirkaŭajo kaj tial pliigenda estas la aktivado por kolektado, forkonduko, purigado de poluakvoj kaj zorgado pri sennoca lokigo de materioj forigitaj dum la puriga procezo. Por daŭrigi la konstruadon de kanalaro estas pluraj variajoj en la teknikaj eblecoj. Krom la lokkarakteraj sistemoj necesas distrikta, regiona kanalizadsistemoj. La tasko enhavas kanalizadon de somerumejoj, lokigon de poluakvojn purigaj aranĝajoj, kunligon de unueca forkondukado de poluakvoj, laŭeble unuecan purigan kaj ŝlimsedimentigan teknologion kaj postan traktadon de purigitaj poluakvoj, sedimentoj. Kompreneble estas harmoniigenda kun tio la ekzistantaj kanaloj, akvopurigaj kaj translevaj sistemoj, la lokaj cirkonstancoj, krome la evoluigaj planoj por aranĝado de terenoj, — kaj registri la areojn utiligeblajn por purigado, lokigo de poluakvoj.

En la regionaj kanalizaj sistemoj, por lokigi la purigitajn poluakvojn, estas uzataj sekvaj solvoj:

— malproksime de Balatono kondukadante en alian kolektejon,
— agrikultura utiligo,
— nerekta enkonduko en Balatonon,
— rekta enkonduko en Balatonon.

„Balatonakvo" havas siajn specialajn kvalitojn, devenantaj per kuniĝo de komplikaj fizikaj, kemiaj, biologiaj efikoj. Por ŝirmi tiujn kvalitojn tiuj solvoj estas la plej konvenaj, kiuj kapablas teni laŭeble plej malproksime de Balatono — eĉ la purigitajn poluakvojn. En la orienta baseno de Balatonregiono la akvokolektejo de riveretoj *Séd* kaj *Ŝio* povas akcepti la poluakvojn. En la suda kaj okcidenta terenoj de la okcidenta regiono de Balatono la poluakvoj estas teneblaj malproksime de la lago kaj post konforma pre-purigado rezerveblaj por parta aŭ plena poluakvo-utiligo, aŭ laŭnecese por plua puriga procezo.

En la norda regiono de la okcidenta baseno en estonto unuavice la arta purigado povas certigi la ŝirmadon de Balaton-akvo.

En tiuj terenoj, kie la poluakvoj ne estas elkondukeblaj el la akvokolektejo de Balatono, oni devas preferi la t. n. naturajn purigeblecojn, kiuj ekonomie kaj sekure solvas tiun taskon. Grava estas tiurilate la profitigo de agrokulturo. Konvene al la celoj oni devas krei izoleblajn ekonomiajn unuojn pritaksante la specifikajn taskojn kaj la danĝerecon de tiuspeca laboro. La tieajn laboristojn oni devas antaŭprepari por tiu speciala laboro.

La regionaj kanalizaj sistemoj havas la avantaĝon, ke ili pli facile estas adapteblaj al la jam ekzistantaj aranĝajoj, aliparte estas necesaj malpli multaj poluakvojn-purigantaj instalajoj. Kompreneble tiuj devas esti lokataj laŭeble malproksime de la refreŝigeja zono. Tion laŭgrade oni solvos.

La regionajn kanalsistemojn sur grandaj terenoj povas priservi centralizataj poluakvon-purigaj instalajoj, kies investado estas finance pli favora, ol tiu de malgrandaj, dise lokitaj instalajoj.

Akva medioprotektado en spaco de Balatono

... havas la celon ŝirmi la salubran lagan karakteron kontraŭ la naturaj kaj artaj nocoj por la ekzistebleco de la refreŝigejaj regionoj.

Ne sole la Balatona, sed la tuta akvokolekta teritorio estas prilaborata en la agadprogramo. En ties kadro estas ekzamenataj aktivadoj de diversaj branĉoj kaj la reciprokaj efikoj rilate unu al alia, je la vivo de lago, de animalaro, akvokvalito kaj ĝia ĉirkaŭajo. Tio ebligas, ke la necesaj intervenoj estu harmoniigite realigotaj.

La aktivadojn por protektado de Balaton-akvo ni resume priskribis, — por igi plena la bildon, ni



Baraĵo kontraŭ akvoerozio ĉe Szomód

mencias ankaŭ la problemojn, kiuj prezentiĝas kiel eblaj nocoj per la agrokulturo.

Ja estas monde konate, ke pro kemiizado de agrikulturo grandiĝis la danĝero de akvopolucio, kio jam tuŝas ankaŭ Balatonon. Por anticipi la nocojn, kiujn la agrokulturo povas efiki je la akvokvalito de Balatono, la kompleksaj esploroj montras la vojon, ja evidentiĝis ke nia granduzina agronomio kapablas funkcii en maniero ne nocanta la medion. Ne estas kontraŭdiro inter la plivastigo de la agrokultura produkta kapacito kaj la enkonduko de metodoj agronomiaj, kiuj priatentas la interesojn de Balatono:

— aranĝo de la ekologiaj kultivaj branĉoj,
— ellaboro de la grund- kaj akvoprotektaj kultivaj sistemoj,
— cirkonspekta* kaj ekonomia uzado de mineralaj sterkoj,
— selektita kaj zorgema adaptado de pesticidoj,
— rekonduko de la nutraj materioj de la likvaj mineralaj sterkoj en la naturan ciklon,
— anticipi la polucion devenantan el maŝinprizorgado kaj el fabrikado,
— zorgema rezervado, manipulado de la movmaterialoj

estas intereso ne sole de la akvokvalit-ŝirmado sed ankaŭ de la agrokulturo. La elimino de la agronomiaj polucioj helpas protekti Balatonon, sed tio povas efiki ankaŭ je la nivelolevo de la mastrumado. Por tion atingi necesas ne nur oficaj severaj dispozicioj, sed ankaŭ la formado de tia aspekto, kiu trasorbas serion de ĉiutagaj agadoj. Sole intensa respondeco povas alporti tiun rezulton, kiun nia socio rajte pretendas — por protektado de nia granda trezoro: *Balatono.*

Tr.: Alfonso *Pechan*

cirkonspekta: singarda, antaŭzorgema, malriskema (vidu: Parnasa Gvidlibro I. kaj E—Hung vortaro)

REVUO DE REVUOJ

Reinhard Haupenthal skribas pri la kontribuo de *Kálmán Kalocsay* al la Esperanta kulturo, en HEROLDO DE ESPERANTO de 1977/3. La aŭtoro citas multajn, interalie la vortojn de *Auld:* „Kalocsay, majstro de la formo, inter 1921 kaj 1939 kvazaŭ mem ellaboris la tutan ‚tradician poezion' de Esperanto. Dum la naciaj literaturoj malrapidege kreskis per la kontribuoj de diversaj verkistoj en tute diversaj epokoj: unu enkondukis la soneton, alia la senriman verson, alia poluris, alia ŝanĝetis — ĉion faris por Esperanto Kalocsay mem, kaj li donis al la samtempuloj perfektigitan fundamenton de tradicio kaj modeloj." Vere en tiaj kondiĉoj de rapida ĝisdatiĝo fariĝis eble starigi normojn ankaŭ en la kampo de la poezio — konstatas Haupenthal. La artikol-serio enhavas detalajn analizojn pri la verkaro de la neforgesebla majstro Kalocsay.

PACO (Organo de MEM) en n-ro redaktita en GDR publikas detalojn el „Trigroŝa opero" de *B. Brecht,* nome la kanton, per kiu Polly aludas al siaj gepatroj sian edziniĝon al la rabisto Macheath; la baladon pri la agrabla vivo (la tradukinto estas d-ro Karl Schulze.) La sama n-ro de PACO rememoras la verkiston *Thomas Mann,* kies naskiĝtago revenis en 1975 la centan fojon. Th. Mann komence estis „tre malinklina al politikaj konfesoj, sed sub la efiko de la mondhistoria evoluo esprimis siajn politikajn konvinkojn pli kaj pli akre, precipe en la batalo kantraŭ faŝismo kaj naziismo" — resumas d-ro *Karl Schulze* en la detala taksado. — Ankaŭ tiu n-ro de PACO okupiĝas pri la Esperanto-literaturo, kiel ŝtoneto en la mozaiko de la paco. *Hella Sauerbrey,* la aŭtoro de la publikaĵo ege ĝuste diras: ...„Hodiaŭ ni scias, ke *helpe de IL oni ne povas forigi la nepacigeblajn kontraŭecojn* inter la militinstigantaj kaj pacamaj fortoj, kiuj estas la veraj baroj rilate al pacama mondo. Ni scias — estas daŭrigate —, ke ne sufiĉas revi kaj paroli pri paco. Por eviti militon oni devas 'klarigi al la homoj, kia estas la reala situacio, kaj levi la vualon, kiu kaŝas la sekreton de la preparado al konfliktoj...' (Lenin). Do, la milito estas realaĵo farita de la homoj, kaj ankaŭ devus esti malebligita de la homoj mem". — La enkondukajn vortojn sekvas valoraj detaloj kaj resumo de dana, vjetnama, hinda literaturoj, krome ĉapitro okupiĝas pri la poezio de *Baghy* kaj *Kalocsay.* Finfine la aŭtoro nomas la unuan verkiston, kiu estis samtempe la kreinto de Esperanto, *L. L. Zamenhof...*" Per siaj kongresaj paroladoj kaj poemoj li donis al ni valorajn atestojn de porpaca E-literaturo originala. Li mem komencis la 'mozaikon de la paco', fiksinte la unuajn ŝtonetojn. Ĉiam denove, li pritraktis la internan pacaman sencon kaj de la IL kaj de la movado mem. Ĉiam denove li atentigis la esperantistaron, ne flankiĝante iri *‚la vojon celitan'* ... Gi estas la vojo de la racio, de la principoj de paca kunekzistado kaj de la sociaj necesoj" — konstatas la aŭtoro.

Multon da jubileoj ni festas, pri tio informas nin la gazetaro. Jubilea konsultiĝo en Moskvo — heroldas STARTO (Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio) 1977/1.: en decembro 1976 en Moskvo kunvenis la ĉefaj reprezentantoj de Esperantaj organizaĵoj en Eŭropaj socialismaj landoj. La konsultiĝon organizis Unio de sovetaj societoj de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlandaj landoj, en kies kadro laboras ankaŭ la Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj. La asocioj informiĝis pri la aktiveco por la jaro 1977, kiu estas plena je eventaj datoj, kiel ekz. la 60-a datreveno de la *Granda Oktobra Socialisma Revolucio,* la 90-a datreveno de *naskiĝo de Esperanto,* kaj la 60-a datreveno de la forpaŝo de d-ro *L. L. Zamenhof* — skribas en la ĉefartikolo *Z. Křimský.* Nun ni festas la 50-a datrevenon de la Ĉeĥoslovaka ŝtata sendependeco kaj libereco, laŭ kio oni estas samtempe invitata al la vizito de la urbo *Česká Trebová* — ni legas en la idente titolita broŝuro. (Eldonis Esperanta rondeto „Amikeco" en Česká Třebová en eldonkvanto 3000, esperantigis S. Štarman.) Informojn mendu ĉe Závodni klub železničaru, Esperantský kroužek, Česká Třebová, Ĉeĥoslovakio. — La urbo situas sur fervojkruciĝo de linioj Praha — Olomouc kaj Praha — Brno, en Orienta Bohemio, kie kontaktas montaro Orlické hory kun Bohemia — Moravia montareto.

INTERNACIISTO (Organo de Kolektivo Esperantista Komunista, Leoben, Aŭstrio) 77/4 publikas artikolon de F. Sch. kun titolo: La revoluciulo. — Antaŭ 150 jaroj mortis *Ludoviko van Beethoven.* En sia letero la majstro skribis al Goethe pri la lingvo: „... Mi promesis al vi sendi iom da materialo kaj vi interpretas tion kiel ‚kavaliran lingvon'. Per kio mi meritas tion? Vi, kiu akceptas tian lingvon en nia demokrata lando?" — citas la aŭtoro. Oni ege atendas la pluajn detalaĵojn, la pluan informon pri tiu eksperimento de Beethoven!

„Ni devas havi tre multajn kaj tre fortajn personajn kontaktojn" — deklaras d-ro *Paul Ariste,* profesoro pri finnugraj lingvoj ĉe la universitato de Tartu (Estonio) — oni povas legi en LA ESPERO (Sveda organo) 1977/2. La tre interesan sciencan intervjuon faris *Geoffrey Sutton.* Kune kun tiu instruo oni ĝojege povas legi en ESPERANTO 1977/3, ke la membraro de UEA kreskis, la pagintoj estis en 1975 entute 32 673, en 1976 entute 33 463. La membraro de UEA troviĝas en 83 landoj. — Prof. d-ro *Helmar Frank* informas nin pri disvastigo de la IL kiel faklingvo, en EUROPA ESPERANTO-REVUO 1976/7—8, kun titolo „Helpo de la esperantistaro nepras kaj efikos." Z. *Křimský,* sekretario de ĈEA same okupiĝas pri movadorganizaj problemoj en la PACO (Eldono de Ĉs-a MEM-sekcio) 1976, kun titolo Fundamento por nia agado. — Zigzage tra Esperantio ni ankaŭ trovis kelkajn legindajn publikaĵojn por enpensiĝo kaj plua faro.

Mária Rózsa *Szabó*

Baroj kaj eblecoj en la socia emancipo de la internacia lingvo

1. En la *socia statuso* de la naciaj lingvoj kaj la internacia lingvo estas evidentaj diferencoj. Unu el ili (eble la pej grava) estas, ke la internacia lingvo (simile al certaj konvenciaj signalaroj) *„koncernas samtempe nur limitan nombron de personoj dum certa difinita tempo, male, en la lingvo partoprenas ĉiu, ĉiuminute, kaj tial la lingvo sentas konstante ĉies influon . . . Ĝin oni ne povas elŝiri el la vivo de la socia amaso . . . (De Saussure, F., 1931)*

Se la nacia lingvo estas konstante uzata en sia etna medio (certigante la koherecon de la koncerna komunumo), la simbolaj lingvoj estas uzataj nur okaze: la sciencan simbolaron uzas la scienculo, kiam okupiĝas pri sia fako, la survojan trafik-signalaron la ŝoforo, kiam trafikas, la mar-kodon la maristoj ktp. Simile ankaŭ Esperanto: funkcias nur „situacie": ĝi estas la lingvo de esperantistoj, kaj estas uzata tiam, *„kiam esperantisto renkontiĝas kun alia aŭ aliaj esperantistoj." (Avronjin, V. A., 1975.)* Certaj lingvistoj *(Deme L., 1975)* atribuas negativan rolon en la emancipo de la internacia lingvo al la fakto, ke ĝi jam estas ies lingvo (t. e. la lingvo de esperantistoj).

2. La fakto, ke la internacia lingvo havas sian *komunumon*, en si mem ne estas ĝia negativa atributo: ĝuste la ekzisto de tia komunumo ebligis ĝian funkciadon, ekziston kaj evoluon. Ne mem la fakto pri ekzisto sed la karaktero de tiu komunumo negative influas. La sociolingvistoj bone konas la fortan influon de certaj afekciaj elementoj en la elekto de iu aŭ alia lingvo kiel interlingva kontaktilo, kojneo,* *lingua franca* k. s. La simpatio al tiu lingva komunumo, ĝia socia aŭtoritato, prestiĝo povas motivi ĉe la homoj la deziron proksimiĝi aŭ eĉ aparteni al tiu lingva kolektivo, fariĝi ĝia integra membro. Ekestas la demando: ĉu la esperantista lingvokomunumo havas socian prestiĝon, aŭtoritaton, estas simpatia kaj alloga — rigardata deekstere? Ĉu ĝi naskas en la homoj deziron fariĝi membroj de la sama komunumo?

3. La spekto-prismon de la neesperantistoj jam deire vualas certaj antaŭjuĝoj — sed ĉu tiuj antaŭjuĝoj havas nenian faktan bazon, ĉu ili ekestis hazarde? Ĉu la *hodiaŭa profilo* (almenaŭ ĝiaj certaj trajtoj) ne pravigas tiujn antaŭjuĝojn?

Manke de ĝenerala kaj reala analizo de la socia konsisto de la esperantista komunumo (escepto ĉikaze estas eble nur la esploroj de *Porster, P. G.)* ni povas baziĝi nur je empiriaj observoj. Memkomprenebleble, la esperantistaro estas super-heterogena. Tamen, oni povas izoli kelkajn tipojn, kiuj plej forte kontribuas al la elformiĝo de negativaj trajtoj de la ĝenerala profilo. La impulso, la sugesto, la motivo kiu ekesperantigas iun, ludas ĉi-teme akcentitan rolon. *Idealistoj*, kiuj en Esperanto trovas tiun novan religion per kiu oni povas savi la mondon; *pragmatistoj* — kiuj uzas Esperanton hobi-cele, egoisme, tute ne interesiĝante pri la sorto de la lingvo mem; *tro-ambiciuloj*, kiuj en la establita mondo ne povis kontentigi siajn nerealajn kaj nemeritatajn aspirojn trovas ĉas-terenon en la Esperanta komunumo kaj fariĝas estroj, poetoj, lingvistoj k. s. Ilia konduto, estante okulfrapa, estas multe pli tuje rimarkebla ol tiuj, kiuj serioze laboras per Esperanto cele de ĝia serioza kaj oficiala socia apliko, ekz. *instruistoj*, kiuj klopodas establi la lingvon en siaj lernejoj, aŭ *fakuloj*, kiuj, esperantistiĝinte ne ŝanĝas siajn fakojn, sed uzas la internacian lingvon kiel scienc-esploran aŭ profesi-kontaktigan rimedon, demonstrante per tio ĝian valoron kaj evoluigante la fakan terminologion.

La plejparto de la anaro nuntempe faras nenion por la *socia emancipo* de la internacia lingvo: male, ĉiurimede klopodas konservi la izolitan, ekstersocian statuson. Kiom ajn paradokse ŝajnus, tamen, tiuj cetere fervoregaj esperantistoj tute simple ne kredas je la seriozeco de la afero kaj konsideras Esperanton maksimume kiel ludon, noblan hobion.

4. *La socia strukturo de la esperantistaro* diferencas laŭ landoj, eĉ ankaŭ en la sama lando povas ekzisti paralele ambaŭ tendencoj. La reprezenta karaktero de la pint-organizaĵo de la koncerna lando dependas de tio: kies intereson kaj kies koncepton oni akceptas. Se oni reprezentas la endoncentran,** izoligan koncepton — la ĝisnuna socia statuso de la internacia lingvo ne ŝanĝiĝos, la socia kontraŭstaro plifortiĝos. Tia organizaĵo ne toleras la aliflankajn tendencojn: la esperantistoj, laborantaj por la socia emancipo kaj integriĝo de la internacia lingvo estos forigitaj el la movado aŭ minimume neglektitaj. Se inverse — la pint-organo de la movado deklaras sia plej grava kaj unua tasko la oficialigon kaj emancipon de la internacia lingvo —, tia koncepto povas toleri (konsciante ke alia ebleco ne ekzistas) la idealistojn, pragmatistojn, tro-ambiciulojn k. s., nur ilian rolon oni malplifortigus kaj ilian karakterizan aspekton paligus.

5. La estonto de la internacilingva ideo dependas de tio, ĉu la esperantista komunumo volos ŝanĝiĝi kaj per tio ŝanĝi la ĝeneralan socian opinion, akceptigi unue psike kaj racie la penson, por povi akceptigi kaj instali poste ankaŭ la lingvon mem.

d-ro I. Szerdahelyi

**kojneo:* vulgargreka lingvo *(koine)* (inter 300 a. K. kaj 300 p. K.). En kojneo estas skribita la Nova Testamento. La kleruloj preferis uzi la klasikan grekan lingvon de Atikaj verkistoj.

***endo—:* (PIV) interne de...

K. Kalocsay:

NI KAJ ĜI

Pi libro de G. Waringhien

Eseoj III. Pri religio kaj arto. J. Régulo eldonisto, La Laguna, 1972. 346 pp. 22x15,5 cm.

Post la du eseo-volumoj, la unua pri literaturaj, la dua pri esperantologiaj demandoj, ĉi tiu tria volumo pritraktas demandojn religiajn kaj artajn, pli amplekse la unuajn. Publikigonte la volumon, la aŭtoro sentis ian ĝenon, pensante pri la eventuala ofendiĝo aŭ indigno de tiuj, kiuj la religion „amas kaj praktikas". Li eĉ metas averton: „estus pli bone por ili, same kiel por mi, se ili ĝin tute ne legus". Nu, ĉi tiun skrupulon mi sentas iom superflua: la religiulo aŭ ĉesigos sen tio la legadon ĉe la unua frazo nekonforma al sia kredo, aŭ legos plu la libron pli kaj pli pasie, por pli kaj pli pasie indigni. Ekzistas ankaŭ tria eblo, sed ĝi estas treege malprobabla, ke nome li perdos sian kredon. La aŭtoro certe scias pri la t. n. „duopa vero" de la famega Aristotel-komentisto *Averroës,* origine *Abu Ibn Rušd* (1126—1198). Laŭ tiu doktrino, oni devas konservi multajn verojn teologiajn, kiuj ne estas validaj en la filozofio (scienco); aliflanke ekzistas filozofiaj (sciencaj) veroj, kiuj ne estas akcepteblaj teologie; tamen ĉiuj veroj estas veroj en sia sfero. Siatempe ĉi tiu doktrino, kiu disvastiĝadis ankaŭ en kristanaj rondoj, volis ebligi, ke la teologio ne baru la evoluon de la scienco; fakte, ne kun granda sukceso: *Averroës* mem estis ekzilita de bigota kalifo. Nuntempe tamen, ĝi estas uzata subkonscie kiel azilo, kien kredulo povas retiriĝi de antaŭ la atakoj de la scienco. Tiel estas klarigeble, ke granda scienculo kredas je la mirakloj de sia religio, sed nenian miraklon akceptus en sia laboratorio. Kaj tiel estas eble, ke homoj, kiuj fieras esti liberaj de religiaj dogmoj, povas esti sklavoj de diversaj ,ofte tute ridindaj superstiĉoj; da tiaj oni trovas ricxan kolekton en la dua ĉapitro kaj oni povas eĉ alproprigi kelkajn.

Multe oni teoriadis pri la origino de la inklino al transcendaĵoj; miaopinie, ĝi devenas el la socia instinkto de la homo. La prahomo pereis eksster sia hordo, kaj la hordo pereis, se ĝiaj anoj ne sentis al ĝi tian ligitecon, ke ili pretis por ĝi oferi sian vivon. Tiamaniere, laŭ la Darwin-a selekto-leĝo pli kaj pli fortiĝis la socio-instinkto kaj iĝis tiel same imanenta en la homo, kiel la migro-instinkto en la migrobirdoj. Sed tio, ke ĉi tiu socio-instinkto povis necesokaze venki eĉ la viv-instinkton, estis neklarigebla alie ol transcende. Tial la profetoj, kiujn ilia speciale forta socio-instinkto devigis, eĉ vivoriske, krii por sia popolo, devis kredi, ke la parolon transcenda potenco, Dio metis sur ilian langon. Poste multaj faktoroj malfortigis la socioinstinkton (ĝia kvazaŭa diluiĝo[1] pro la kresko de la sociounuoj; estiĝo de klasoj sociaj), sed tamen ĝi ne pereis: la historio gardas memoron de homoj ĝis en nia jarcento, kiuj iris vole en la certan morton por la bono de sia popolo aŭ klaso. Eble plej dangere efikas kontraŭ tiu instinkto la anarkio de la libera konkuro, tiu batalo de ĉiuj kontraŭ ĉiuj; sed ni esperu, ke tiu damaĝo, tiel same kiel la mediopoluado, estos ankoraŭ riparebla.

Sed mi eble jam nedece transpasis la kadrojn de recenzo. Se reveni al mia tasko, mi diru, ke la enkondukaj ĉapitroj de la libro okupiĝas pri aferoj pre- aŭ preskaŭ-religiaj: sanktaj lokoj, magio, besto-kulto, tabuoj, omaĝo al Egiptio kiel al prafonto de spiritaj trezoroj Mediteraneaj. Poste la aŭtoro ellevas el la Bibliaj profetoj la unuan revoluciulon, la paŝtiston *Amos,* kriantan por socia justeco, kaj la unuan evangeliiston, la grandan *Anonimulon* (Jesaja, 40—45), ĉe kiu unuafoje aperas la ideo de la per-puna savo. La judoj — li diris — devis suferi pro siaj kulpoj per deportado fare de Nebukadnecar, sed la puno estis tiel peza kaj terura, ke ili per tio pagis substitue ankaŭ pro la kulpoj de aliaj popoloj. Ĉar la juda popolo heroe konsentis esti viktimo, ĝi estos savita: ĝi havos sian Mesion, sian Kriston en la persono de la persa reĝo Ciro (Kyros, Kuraš). Kaj li pentras paradizan bildon pri la venonta mesiana regno.

Post ĉi tio ni jam venas al loko, kie ŝajnas validi la aŭtora averto: temas pri la origino kaj evoluo de la *kristana* religio. La leganto, kiu eble certis, ke la vivo de Jesuo-Kristo, lia instruo, la fundamentoj de la religio de li fondita estas sendube kaj klare dokumentitaj en la evangelioj kaj en la leteroj de la apostoloj, nun devas sciiĝi, ke en tiuj dokumentoj multo, preskaŭ ĉio estas duba. La aŭtoro, sub la efiko de infanaĝaj memoroj, en aparta ĉapitro, entenanta dialogon kun kredantino, omaĝas al la rava revo de Kristnasko prikantita de tiom da poetoj; sed el la legendo de Kristo li ne povas elsavi pli, ol noblan, modestan, bonkoran revulon, kiu, en tiuj tempoj, plenaj de febra atendo, firme kredis, ke la Regno de Dio alvenos ankoraŭ por lia generacio, ke ĝi alvenos tiel certe kaj nerezisteble, ke nenia armila batalo estas necesa por ĝia alvenigo. Sekvas la demonstro de tio, kiel la kristana religio evoluis sub la efiko de diversaj Mediteraneaj religioj, precipe sub tiu de la Isis- kaj Mitras-kulto; tiu influo komprenigas la apoteozon de Jesuo, la teofagion[2] de la komuniiĝo kaj ankaŭ la kulton de la Sankta Virgulino, kies epiteton „reĝino de la ĉielo" oni aplikis jam antaŭlonge al la diino Aŝtarta (Jeremia, VII. 18.). Sed kompreneble ĉio ĉi estas nur simpla kaj lakona resumo de la verko, en kiu kun scienca (aŭ satana) sistemeco, kun malkovro de surprizaj antinomioj, per konfrontado de la citaĵoj el la „Sanktaj Skriboj" kaj per ĉiuj rimedoj de la ekzegezaj[3] esploroj, tamen facile kaj intime, preskaŭ babile, kun la lerta scio dozi ĝustmezure spicon kaj salon, oni estas grade inicata en la hermetaĵojn[4] de la moderna scienco de religio-historio.

Tie kaj ĉi tie en la libro troviĝas ankaŭ aludoj pri la stato kaj perspektivo de la homaro. Laŭ ĉi tiuj, eble sub la influo de Lanti, la aŭtoro ŝajnas ne sufiĉe konscii pri sortodecida signifo de la 1917-jara *socialisma revolucio.* Li brulstampas ja la teruraĵojn de la infan-ekspluato kapitalisma en Lyon kaj Manchester meze de la industriiĝanta 19-a jarcento, sed ne konkludas el ĝi, kiel grandan ŝarĝon devas meti la origina akumulado sur la ŝultrojn de la popolo. La Lanti-skolo, kaj multaj aliaj, argumentas, ke en Ruslando mankis la kondiĉoj por la socialismo, tamen samtempe ili postulas tie tujan paradizon de demokratia socialismo. Stranga blindeco estas ne vidi, ke, unue, oni devas krei pene-klopode la kondiĉojn sub socialisma regado; tion oni nomas „konstrui la socialismon"; due, ke

dume ĝuste la nesufiĉeco de la kondiĉoj povas naski multon riproĉatan. Alinflanke, la *burĝa kapitalismo*, en kiu Hegel siatempe vidis la kulminon de la homa historio, malgraŭ tia evoluo de la produktofortoj, ke oni jam povas ĝin nomi tro matura, kondukas prefere al konfuzoj ol al harmonio, prefere al ekonomiaj perturboj ol la ekonomia ekvilibro, dum en Sovetunio kaj en la orient-Eŭropaj socialismaj landoj oni vidas iom-postioman, sed certan evoluon al la vera, politika kaj ekonomia demokratio. Ne ĥiliasme kaj eskatologie[5], sed kiel *Marx* antaŭvidis: „La laborista klaso ne havas pretajn utopiojn, efektivigendajn laŭ popola rezolucio. Ĝi bone scias, ke por atingi sian liberigon kaj kun ĝi tiun pli altan formon, al kiu la nuna socio, sekve de sia ekonomia evoluo, nerezisteble rompas al si la vojon, ĝi devas trapasi multajn luktadojn, tutan serion da historiaj procezoj, kiuj ŝanĝos kaj la homojn, kaj la cirkonstancojn". Aŭ, kiel la aŭtoro mem diras bele: „Homa progreso kalkuliĝas... ne laŭ la skalo de niaj efemeraj tagoj. Paciencon, paciencon, paciencon!..."

La dua parto de la libro, tiu pri la arto, estas verva, entuziasma, emocia apologio de la arto, ĉu ĝi aperas en arkitekturaj mirakloj, aŭ en la reprodukto de la nudo, aŭ en la kasteloj de la Loire-valo, la „Ĝardeno de Francio" aŭ en la franca renesanco, aŭ fine en la tiel amata arto de la „olda, pentrinda Nederlando". Fine, en la ĉapitro „Kien do la arto?" ni legas maltrankvilan meditadon pri la aktualaj arto-tendencoj kun multa inklino al kompreno kaj kun granda skeptika demandosigno.

Riĉega libro, al kiu oni sentas emon re- kaj reiri, certe pro tio, ke oni trovos ĉiam novajn ekscitajn interesaĵojn, nerimarkitajn en la treno de la unua legado.

---

[1] *dilui: maldensigi fluidaĵon per solvilo, dissolvi.*

[2] *teofagio: dio-konsumado (fakterm ino).*

[3] *ekzegezo: teksto-klarigoj baze de sciencaj metodoj, spec. pri Biblio.*

[4] *hermeta: forte fermita; ĉi tie: nekonata de la publiko.*

[5] *utopiaj (religiecaj) instruoj pri sorto venonta de la homaro; ties specoj estas:*

eskatologio: precipe pri la finaj fazoj de la homaro (mesianismo, lasta juĝo, k. s.);

ĥiliasmo: pri dia regno, tera paradizo, venonta miljaro(j)n post ia mesaĝo (teologiaj fakterminoj).



László Miklosovits: Ilustraĵo al Radnóti

A. GOODHEIR

TAGO DE LA SOLULO

Murojn kovras fulgo de jaroj,
flagstangojn kaŝas fumnebulo.
Ĉesas vento, sinkas flagoj:
Jen la tago de la solulo.

En haladzo, surdiga bruo,
vane sloganas laŭta buŝo.
Ĉu espero venas el dubo?
Jen la tago de la solulo.

Cerbumado detrua, ŝira,
bomboj, raketoj, terofuŝo.
Hodiaŭ vekas tremo mira:
Jen la tago de la solulo.
Ĉu krepusko, ĉu lumkomenco,

ĉu forflagro, ĉu vivekbrulo?
Miras koro, murbatas penso:
Jen la tago de la solulo.

JIŘÍ KORÍNEK

GETECA

*Trindakis versmajstro von Goethe**
la vinon kun akvo freŝklara,
pri tio ekridis mokete
la gastoj ĉe tablo najbara.
Per famaj ĉi versoj kun pret':
respondis spritplene l' poet':

De akvo nur sola rezultas,
ke fiŝoj silentas nur mute,
de vino nur sola ke stultas
atestas sinjoroj apude.
De ambaŭ por savi do min,
miksadas mi akvon kun vin'.

---

*prononcu fon. Gete.

MIRA ANDRUSEWICZ

PATRO

Arĝentoplena harar',
reto de aranea sulketo...

Sufiĉis apogi frunton
je lia brako —
li komprenis eĉ spiron
senmire.

La esploremaj okuloj,
la mutanta buŝ',
nur demando rigarda
— vi spertas vivon?
Estu singarda!

La manon kovris manplato
de solescepta
patro-frato,
de li
— vireco pacdono,
li
— la heroo de Monto-Cassina
kaj de alio sennoma
batalar' de vivo;
li modesta, heroa
sen troigemo
— jen poemo
pri amiko la mia
kompreninta min
bonan, min fian
kvazaŭ mi estus por li
diafana.
Ho, mistero sekreta —
li heroa —
— li nun ero de l' tero
eta. —
Li, kiu flugon al la lun'
promesis...

Estingiĝis la okuloj,
silentiĝis buŝ',
glaciiĝis koro
en iu horo —
tamen mi ne forgesis
mi memoras
kun kortuŝ'.

Hungara Esperanto-Asocio baldaŭ aperigos la jubilean antologion de la Belartaj Konkursoj. La jena poemo ricevis trian premion en la jaro 1969.

Homo en la malhomeco

Ni citas la titolojn de kvar poemlibroj de Endre Ady (1877—1919). Ensendi sufiĉas nur la titolojn kaŝitajn en la vicoj horizontalaj 1., 10., 56. kaj vertikala 12.

Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.



HORIZONTALAJ: *1. Titolo de la poemlibro aperinta en 1906. 10. Titolo de la poemlibro aperinta en 1909.* 12. ... tekniko: arto helpi la memorkapablon. 13. Turka greno (R). 14. Brilblanka globeto formiĝanta en markonko (R). 15. Maro inter la Apenina kaj Balkana duoninsuloj (R). 16. Klinko. 17. Cirkloforma. 18. Tenejo ekz. por pafiloj, pipoj (R). 19. Peni ne renkonti iun (R). 20. Provizora tranoktejo en mizera stato (R). 21. Greta Stoll. 22. Junulo (R). 23. La matena trinkajo (kun art.). 24. Titolo de poemo de Kalocsay. 26. Sufikso esprimanta kolekton. 27. Aro da ludantoj. 28. Dolĉaĵo (R). 30. Membro. 31. Varmege, brulege. 33. Mezuro de kvalito (R). 34. Senparaj literoj de vualo. 35. Rilata al kalka bastoneto. 38. ... de aranĝo; dum la aranĝo. 39. Fina rezulto de sengola maĉo (!). 40. Mondfama franca, dekadenta, simbolista poeto (Charles, 1821—67), ankaŭ Ady tradukis hungaren kelkajn liajn poemojn, 42. Hinda piulo perfektiĝanta per korpaj rigorajoj (R). 43. „Loĝejo" farita el tolaĵo (R). 44. Komparativa konjunkcio. 46. Havigas al si. 47. Ideo konforma al la realo. 48. Sulfuro kaj silicio. 49. Glitveturilo. 50. La pliforta sekso. 51. Zonfiksilo. 52. Vendendaĵo. 53. Interna malmola parto de frukto (R). 54. Prezidento de Aŭstria Respubliko, esperantisto (Franz, 1899—1975). 56. Titolo de poemlibro aperigita en 1907.

VERTIKALAJ: 2. Verbo de maro. 3. Produkti, krei (R). 4. Ŝati kare iun. 5. Jodo kaj oksigeno. 6. Publika veturilo (R). 7. Oriento (R). 8. Memo (la propra) persono. 9. Sufiikso por esprimi specojn de malsano. 10. Irigo de iu, portigo de io. 11. Soveta urbo apud la fervojlinio inter urboj Engels kaj Astraĥano. 12. Poemlibro de Ady, eldonita en 1912. 14. Rilata al ĉevalspeco. 16. Tro monŝpara (R). 17. Movi ion reen al si (R). 19. ... mologio: scienco pri insektoj. 20. Malgraŭ tio. 22. Skulptita juvelŝtono (R). 23. Spaco por io (R). 24. Mallarĝa vojeto. 25. Leĝe, jure. 26. Membraro (R). 28. Epoko. 30. Entuziasmege. 32. Aŭdigis konfuzajn sonojn. 33. Atenti, zorgi por eviti danĝeron (R). 35. El tio fariĝas la ĉokolado. 36. Ebeno limiganta volumenaĵon (R). 37. Reciproka sekvo de unu post la alia. 38. Filmprezentado. 40. Kelta poeto-kantisto. 41. Viviga nesimpla gaso. 42. Konscii pri siaj meritoj. 44. Virnomo (R). 46. Parto de skribmaŝino kaj fortepiano (R). 47. Senpeka, netuŝita (R). 48. Post vetero malbela lumas ... plej hela (Zamenhof). 50. Alproksimiĝi (R). 51. Verbo de hundo (R). 53. Kaj aliaj. 54. Jesanta adverbo emfaza. 55. reen: finaĵo por futuro.

Imre *Szabó*

LINGVAJ LUDOJ

Magiaj literkvadratoj

Ili estis konataj jam en la antikva epoko. La plej fama literkvadrato latina estas la t. n. SATOR-AREPO. Ĝi troveblas kaj sur la muroj de malnovaj konstruaĵoj kaj sur diversaj arkeologiaj trovaĵoj. Unu ekzempleron malkovris profesoro Matteo della *Corte* en 1925, en *Pompeji*. La alia interesaĵo de tiu kvadrato estas la fakto, ke ĝi konsistas el la literoj de „Pater noster".

Ankaŭ la fama hungara poeto János Arany (1817—82) faris similan en la hungara lingvo (vidu apude).

Kiel tiom magiaĵoj, ankaŭ literkvadratoj iĝis ludo dum la lastaj jarcentoj.

Ankaŭ en Esperanto troviĝas jam simila, sed pro manko de loko ni bedaŭrinde ne povas citi ĝin. Jen, ekzemplo, far mi. Provu ankaŭ Vi, kaj sendu al la redakcio ĝis la 31-a de oktobro.

La reguloj estas jenaj:

— la mezaj linioj kaj horizontale kaj vertikale estas samaj,

— la aliaj vicoj estas palindromoj.

Multan sukceson al la ludo.

Imre Szabó

S	A	T	O	R
A	R	E	P	O
T	E	N	E	T
O	P	E	R	A
R	O	T	A	S

T	A	K	A	R
A	D	O	M	A
K	O	N	O	K
A	M	O	D	A
R	A	K	A	T

K	A	S	E	T
A	K	I	R	E
S	I	D	I	S
E	R	I	K	A
T	E	S	A	K

Humuro

Renkontiĝo. Du pensolegistoj renkontiĝas. Unu el ili diras:

— Mi ĝojas, kara kolego, ke vi fartas bone kaj gaje. Kaj kiel do fartas mi?

La okulo. La usona poeto *Walt Whitman* konatiĝis kun misfame avara bankiero, kiu fieradis pri tio, ke lian vitran okulon ne eblas distingi de la alia.

— Nu, kiu mia okulo estas el vitro? — li demandis la poeton.

— Facila demando — li respondis — la dekstra.

— Fakte. Sed kiel do vi tion divenis?

— Mi rimarkis, ke el tiu okulo radias iom da boneco.

En Londono du verkistoj, la dika *Chesterton* kaj la magra *G. B. Shaw* ofte ĉikanis unu la alian. Foje Chesterton diris:

— Vin vidante oni pensas, ke en Britlando estas malsat-mizero.

— Kaj vin vidante, — respondis Shaw —, oni pensas, ke la kaŭzo de tiu malsatmizero estas vi.

Korespondi deziras

S-ro Győző *Gaál*, H—4031 *Debrecen* (28-jara), kol. bk, diapoz., E-aĵojn; pri turismo, arkitekturo, groto-esploro.

S-ino Stanislawa *Romaszkan*, PL—05—152 *Debina* 27, p-ta Czosnow; (45) pri popolkutimoj, ekskursoj en Francio.

Kolektivo de nutraĵvendistoj serĉas samprofesianojn. S-ro Jan *Holada*, Magazeno Sokolniky, CS—180—00 *Praha.*

Kosju *Nejkov* (25), ĉ. l., ĉ. t. kun tuta mondo, pri astronomio, moroj, kutimoj BG—9000 *Varna*, poste restante.

Tõnu *Kirsik* (18) studento de biologio, pri filmarto, moderna muziko, naturo: SU—202 615, *Värska*, Estonio.

S-ro Jan *Vedevik*, mezaĝa, kun e-istinoj: S—40101 *Göteborg*, poste restante.

F-ino Danuta *Wisniewska*, (20), PL—87—617 *Bobrowniki* n. Wisla.

F-ino Ursel *Adamski* (20), PL, *Stonsk Górny*, pta Ciechocinek.

S-ro Wojciech *Wisniewski* (22), PL *Wloclawek*, ul. Budowlanych 8 m 74.

Mgr. Barbara Rogowska (30), bibiliotekistino, kol. ekslibrisoj, bk, PL—41—902 *Bytom*, str. Zeromskiego 3 m 13.

Mgr. Adam *Lezak*, prez. de E-klubo, geologo (30), kvakerismo, Eo, PL *Opole*, str. Pasieczna 4m3.

S-ro Jozef *Zielonka* (40), pri E-ismo, religioj, PL *Tarnow*, str. J. Krasickiego 9.

S-ro Andrzej *Kiczor* (30), instr., aktivulo, pri E-ismo, PL—45711 *Opole*, str. Wandy 3/1.

S-ro *Nobbiati* Angelo, pĉt. I—20100 *Milano*, Via Postumia 26.

S-ino *Cominato* Sara, pĉt. I—20100 *Milano*, Via Constant 26.

S-ro *Balsamo* Giulio, pĉt. I—20100 *Milano*, Via Barili 8.

S-ro *Lizeri* Lucio, pĉt. I—20100 *Milano*, Via Pianel 54.,

S-ino *Sanfilippo* Giovanna, I—20100 *Milano*, Via Conc. Vaticano 10.

ŜAKO

"Gens una sumus" – Unu gento ni estas

Rubrikestro: D-ro Jozefo Németh

7-a numero:

JULIO NEUKOMM

„Good Companions" 1923

4.



Mato en 2 movoj (komencas B1)

B1: Rg1, Da8, Th5, Kf5, Ĉé7, b2, c4, d6, é6, f6, (10)

Ng: Ré5, Kh1, c5, g2, g4, (6)

Limdato de la solvo: *20-a de okt.* Sendota al la redaktoro (sur la koverton: „ŜAKO"). Ĉiujare ni donos premiojn en 3 okazoj (po 2 pecojn). La solvo de 6-a problemo: ŝlosilmovo estas *1. Rf6!*

* * *

Urbo Kalocsa: la 16-an de majo la esperantistoj kaj esperantistaj ŝakludantoj transloĝiĝis en la novan klubejon! Samtempe okazis prelego pri la multlingveco (d-ro I. Szerdahelyi) kaj ŝaksimultano.

* * *

La landa fakgrupo atendas novajn membrojn, esperantistajn ŝakludantojn (vidu: HV. 2/77.)

Pro la bonaj solvoj de la problemoj (3-a kaj 4-a) gajnis libropremion per lotado: W. (GFR) kaj A. Keresztes (H).

ŜAKLEKSIKONETO

La unua ŝaklibreto hungara: en la venonta joro ni jubileas. La unua ŝakliberto (hungara) aperis antaŭ 220 jaroj! Ĝi estas specialaĵo, senpara peco. Sur ĝia titolpaĝo estas legebla:

SÁCH, AVAGY KIRÁLYOS JÁTÉKNAK SZABOTT REND-TARTÁSI.

(Ŝako, aŭ fiksitaj regularoj de la reĝa ludo.) Presita 1758, en urbo Buda. La libreto konigas — ĉefe — la elementajn regulojn de la ludo: la tabulon, fundsituacion de la figuroj, manieron de la movo kaj figurkapto.

En po unu memstara ĉapitro ĝi klarigas signojn kaj movomanierojn de ĉiu ŝakpeco. Oni trovas en ĝi instruhavajn pensojn. Konservejo de la libreto estas Országos Széchenyi Könyvtár (Landa Biblioteko Széchenyi).

Leterkesto

Abunde venis lastatempe tiaj leteroj de niaj legantoj, kiuj sintezas iliajn impresojn pri HV, rimarkas kaj atentigas je plifortigindaj „paĝoj" de nia revuo. Per tia korespondado utile kreskas la komunikado inter redakcio kaj legantaro, venas ofte spritaj ideoj, nepre pripensindaj dum redaktado. Ja, tio estas ofte kaprompa laboro, kiam oni ne povas al si imagi kiel efikos iu nekutima temo aŭ nove elpensita rubriko. Despli alportas trankviligon al la redakcio, kiam venas *avertoj,* admonoj, por ne paroli pri sisteme analizaj *laŭdaj instigoj.* Iom hezitante, ni citos nun ankaŭ el la lastaj.

Viktoras Baniulaitis, Klaipéda, Litova SSR, raportis pri la cent-membra E-klubo kun foto de la ejo; „sen HV mi ne imagas mian pluan laboron en nia movado: mirinde interesega revuo! mi certas, ke ankaŭ por ĉiuj legantoj, kvazaŭ aldona lernolibro, ĉar la stilo estas senriproĉa; mi legas ĝis la lasta linio". Jen direktilo por ni.

Ernest Green, Greenford, Anglio, detale aprecas la redaktadon; i. a. li *klare esprimas* ofte alvenantajn pensojn de eksterlandaj abonantoj; „la lingvo de tiu eta, tamen tre alloga kaj kultur-riĉa lando meze de Eŭropo estas fermita pordo por mi. Tamen ĝi malfermiĝas pere de „ŝlosilo" E kaj HV, senmila tenejo pri la historio, arto, literaturo, muziko k. c. kun l'atingoj estantaj kaj l'aspiroj estontaj... de Hungario! Trezorejo por mi..."

Bertil Englund, BRD—8670 Hof, admonas E-klubojn *aboni* Heroldon, Pilo-Press, HV kaj revuon de UEA, anstataŭ foruzi kolektivan monon por aliaj celoj: pli imponas montri al publiko belaspektan, riĉ-enhavan revuon. „Dank' al Esperanto! oni estis informita pri la hungara *filmarto* (1/77 nro), per la bonega artikolserio pri la urĝe aktuala *medioprotektado,* tiom intensiva en Hungario, ke servas kiel konsolo kaj lumostrio de espero en nia mondo, plena de pesimismaj prognozoj. Kun speciala intereso mi sekvis la intervjuserion pri la monda lingvo-problemo, ĝuste de ne-esperantistoj. Estis ĝojo legi pri debuto de *poetinoj.* Kiel muzikisto mi legas avide la elstarajn artikolojn pri la hungara *muzika vivo;* mi jus aliĝis al *Varia Int. Semajno* en via ĉefurbo, precipe por partopreni somerajn koncertojn kaj renkonti kelkajn redakcianojn persone..." Memkompreneble ni redakcianoj kaj movadanoj plezure kaptas la okazojn persone interkonatiĝi kun niaj legantoj — ofta afero! — kaj helpas iliajn restadon kaj interesiĝojn en nia lando multmaniere!

Jean-Pierre Danvy, Parizo, substrekas gravecon de *modernaj* temoj ekz. kino, sciencfikcio k. s., kiuj ŝajnas el inter la plej legindaj en E pro la nivelo... „Laŭ mi, 24-jara, tradukoj de poemoj el la 18-a jarcento ne multe interesas junajn legantojn..." Foj-foje estas eble tamen elteneblaj strofoj de iamaj poetoj pri ĉiamaj, eternaj homaj aferoj!?

Reia Kiviaru, Viljandi, Estona SSR, en nro 1/77 trovis plej plaĉa „La nova instruisto", novelon de B. *Potts.* La plurflankaj artikoloj pri la filmarto revkis en lian memoron iam rigarditajn bonajn hungarajn filmojn — kaj la sopiron ĝui la novajn baldaŭ. De *Literatura Metiejo* estas postulata pli da instruo, ja „ĉi-foje proksimiĝis al kutima recenzo". Via deziro — ĉu ankaŭ de aliuloj? — legi pli vaste pri aferoj de *agrikulturo,* estas konsiderata.

Por multaj, kaŭze de nun ne-cititaj sugestoj kaj rimarkoj la redakcio esprimas *samideanan dankon!*

Urĝeca valizo por kuracistoj

La hungara Ministerio pri Sanitaro provizas la distriktajn kaj uzinajn kuracistojn per speciala urĝeca valizo, por uzi ĝin surloke ĉe akcidento aŭ alia grava traŭmato. La valizo pezanta 4 kg-jn enhavas bonegajn aparatojn *por reanimado* kaj vivosavajn medikamentojn, kiuj tre grave helpos la kuracistan unuan helpon ĉe la plej danĝeraj kazoj. Komence oni provizos per tiu urĝeca valizo la provincajn ambulatoriajn staciojn de granduzinoj; krome la distriktajn kuracistojn, dejorantajn preter la ĉefaj landvojoj, kie okazas pli da akcidentoj, kaŭzantaj ofte gravajn traŭmatojn (difektiĝojn). Poste estos provizataj ankaŭ aliaj kuracistoj, tiel, ke post unu jaro jam 20%-oj de la kuracistoj en Hungario ĉiam havos ĉemane (devige ankaŭ en siaj veturiloj) tiun urĝecan valizon por eventuala vivosavo.

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro István Nagy
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Császár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits

Ĉefkunlaborantoj:
Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII.,
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: D-ro Péter Suth direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

77-2992 Somogy m. Nyomda 3000
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377
ISSN 0018—7704

LEHEL

LIZENZ BOSCH HAUSGERÄTE

BOSCH 200 * * *

Ultrafridujo 20 litra

temperaturo sub —18° C

Prezo: 6050 Forintoj

Fabrikas: Hűtőgépgyár — Fridujfabriko

Eksportas: LEHELEX

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en subaj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto
internacie ŝangebla

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27., kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért